

Holokaŭsto en Pollando:

SUFERO, BATALO KAJ EKSTERMADO DE LA BJALISTOKAJ JUDOJ

Rezista movado en la Bjalistoka geto (1941-43)

Raporto de Szymon Datner, 1945

*Kontribuajo al la 100a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof,
kreinto de Esperanto, kiu naskiĝis en Bjalistoko,
en Varsovio, la 14an de aprilo 1917*

Por ke la terura historio ne forgesiĝu nek ripetiĝu

Biografia enkonduko

Szymon Datner, naskita la 2an de februaro 1902 en Krakovo, estis instruisto por sporto, muziko kaj historio kaj laboris en la judaj (hebrea) gimnazioj de Kielce (1922-23), Pinsk (1924-28) kaj Bjalistoko (1928-39). En 1927 li doktoriĝis en la Jagielona universitato de Krakovo per antropologia studo pri judaj infanoj en la regiono de Kielce.

Dum la germana okupacio de Pollando Datner vivis kun siaj edzino Róza kaj filinoj Miriam kaj Ŝulamit en la Bjalistoka geto.

En la nokto de la 24-25aj de majo 1943 Datner fuĝis el la geto kun grupo de 18 viroj (inter ili troviĝis ankaŭ kelkaj iamaj lernantoj de Datner en la hebrea gimnazio de Bjalistoko) por aliĝi al la partizanoj de la grupo „Forojs“. Sed la fuĝintoj ne sukcesis atingi la arbaron kaj decidis pro konsidero de la sekureco reveni al la geto, kie okazis interpafado kun du germanaj gardistoj. La 3an de junio lia provo fuĝi el la geto finfine sukcesis, dum lia familio restis kaj pereis en la geto.

Jam en la geto Datner komencis skribi pri la neniiĝo de la judoj de Bjalistoko. En printempo 1944, kiam li troviĝis en la arbaro proksime de Supraśl, li daŭrigis okupiĝi pri la kronikado de la holokaŭsto, al kio apartenis ankaŭ la atesto de partizanoj, kiuj vidis la germanojn fari krimojn.

La 27an de julio 1944 la Ruĝa Armeo „liberigis“ la urbon. Al Bjalistoko Datner revenis en aŭgusto. De iamaj 50 mil troviĝis en la urbo ankoraŭ 114 judoj kaj la juda kvartalo estis detruita. Post la liberigo de Pollando de la germana okupacio pli da judoj revenis al Bjalistoko, kie Datner loĝis en la Sienkiewicz-strato 79. Li engaĝiĝis same kiel aliaj judaj postvivantoj en diversaj komisionoj en Pollando kaj aliaj landoj kiel kronikisto de la holokaŭsto kaj fariĝis membro de la Regiona Nacia Konsilio (Vojevodia Popola Konsilio WRN) kaj kunlaboranto de la Historia Komisiono ĉe la Juda Vojevodia Komitato de Bjalistoko, kiun li prezidis de novembro 1944. Kun konsterno li konstatis, ke la vivdanĝero por judoj tute ne finiĝis kaj ke la kontraŭjuda perforto pludaŭris en certaj polaj naciaj kaj antisemitismaj medioj, kiuj bedaŭris, ke „Hitlero elsarkis nur 99% de la juda popolo en la regiono“. Tiun perforton, pri kiu li raportis al la Konsilio, li dokumentis sisteme laŭ unuopaj kazoj, prononcis paroladojn okaze de funebraj ceremonioj por la viktimoj, kiuj estis mortigitaj de poloj, alvokis la socion batali kontraŭ la perforto, la krimoj kaj la murdistoj kaj kritikis la pasivecon de la pola politiko, precipe de la justicministerio ĉe la jura persekutado kaj punado de krimoj, en kiu li malkovris komplikojn de la murdistoj. Pro tio li ekhavis seriozajn problemojn kaj estis vokita antaŭ la regiona tribunalo de Bjalistoko por klarigi sian „publikan ofendon de la ministerio“. Dum tiu kunsido la sentima advokato de la judoj kaptis la okazon por publike atentigi pri la kontraŭjuda perforto en tiu tempo (pro tiu „ofendo“ Datner estis kondamnita al okmonata

arestado en prizono!). Aliflanke, Datner laŭdis la pretecon de unuopaj polaj familioj, precipe kamparanaj kaj laboristaj, protekti judojn dum la milito (vd. ekzemple la memuarlibron „Mia stelo“ de Felicja Raszkin-Nowak, kiu estis tradukita al Esperanto, aŭ la aŭtobiografion „Mia vivo“ de Marcel Reich-Ranicki). Datner sukcesis ricevi monon de la Centra Komitato de polaj judoj kaj de la Bjalistoka Centro en Novjorko por la rekonstruado de la juda vivo en Bjalistoko, precipe sur la kampoj de la klerigo kaj sano. Malgraŭ tiuj klopodoj, nur malmultaj judoj restis, ĉar la iama juda Bjalistoko ne plu ekzistis same kiel la kondiĉoj por reala juda vivado. Malgraŭ la grandega katastrofo por la judoj kaj la daŭraj minacoj kontraŭ ili en la postmilita Pollando, Datner ne ĉesis kredi je la estonteco de la juda popolo.

Datner verkis en la jida kaj pola lingvoj. Lia ĉefa teksto, kiu estis finverkita en decembro 1945 en Bjalistoko, koncernis la historion de la bjalistoka geto kaj aperis en 1946 kiel 46- aŭ 48-paĝa broŝuro sub la titolo „Walka i zagłada białostockiego ghetta“ [batalo kaj neniigo de la Bjalistoka geto] ĉe la Centra Juda Historia Komisiono en Lodzo. En la epilogo Datner menciis la fifamajn „operacojn kontraŭ infanoj“ en la getoj de meza kaj orienta Eŭropo, kiujn la germanoj lanĉis por mortigi milionojn da judaj infanoj. En la sama jaro Datner verkis por la Komisiono en Bjalistoko traktaĵon sub la titolo „Der kamf un khurbn fun jidishn bialistok un bialistoker provints“ [la batalo kaj neniigo de la juda Bjalistoko kaj de la bjalistoka provinco], kiu ampleksis 21 ĉapitrojn kaj traktis la kontraŭjudajn pogromojn en Wąsosz, Radziłów, Jedwabne, Stawiska, Kolno, Wizna kaj Zaręby Kościelne en somero 1941 sub la germana okupacio, kiujn partoprenis ankaŭ etnaj popoloj en la menciitaj lokoj, al kiuj Datner riproĉis, ke ili profitis ekonomie el tiu partopreno. Ambaŭ verkaĵojn Datner dediĉis al la „memoro pri la 200 mil judoj de la bjalistoka vojevodio, kiuj estis murditaj de la germanoj“. Poste Datner verkis ankoraŭ la rakonton „Nazywam się Halinka i mam cztery latka“ [mi nomiĝas Halinka kaj estas kvarjara], aperinta en 1969. Ĝi estis iusence omaĝo al liaj du filinoj, kiuj kruele pereis dum la holokaŭsto kaj ne havas tombon.

En la jaroj 1946-48 Szymon Datner vivis en Palestino por okupiĝi pri sia malsana patro. En majo 1948 li revenis al Pollando, kie lin atendis lia estonta edzino Edwarda Orłowska. Post la translokiĝo al la ĉefurbo li fariĝis kunlaboranto de la Juda Historia Instituto en Varsovio, unue kiel scienca kunlaboranto, poste, de februaro 1969 ĝis majo 1970, kiel direktoro.

Datner verkis 18 aŭ 19 librojn, ĉefe pri la holokaŭsto en Pollando kaj la militkrimoj de la germanoj. Unuafoje iu historiisto kaj atestanto de la holokaŭsto en Pollando prezentis al la pola publiko la rezultojn de siaj esploroj. Sed ju pli forte kaj monopolisme la komunisma reĝimo establiĝis kaj firmiĝis, des pli Datner adaptiĝis al la nova ĝenerala tono de la oficiala historiografio, kiu reinterpretis la militon el pola nacia kaj komunisma vidpunkto, kaj ĉesis ataki ‘normalajn’ polajn civitanojn pro la kulpo pri la kontraŭjuda perforto kaj parolis nur ĝenerale kaj nebule, fokusante la kulpigon al la germanoj, kaj, koncerne la polojn, al krimaj, ekstersociaj kaj faŝismaj elementoj en la pola komunumo. Ĉu tio estis la sekvo de la cenzuro, aŭ memcenzuro, kiu pli kaj pli efikis kaj kulpis pri tiu metamorfozo en la sinteno de Datner, kiu ŝajne perdis la kuraĝon por diri la veron? En tiu oficiala pola komunisma historiografio, kiu estis adaptita al la stilo de la sovetia modelo, devis esti reprezentata la vidpunkto, ke poloj kaj judoj estas egale traktendaj viktimo-grupoj de la germana murdpolitiko, dum la fakto, ke ankaŭ inter ‘normalaj’ poloj ekzistis kulpuloj kaj profituloj de la juda murdo, estis nete prisilentata (la publika debato pri tiu temo komenciĝis nur en la jaro 2000 post la apero de la libro de T. Gross pri la juda murdo en Jedwabne, kiu kaŭzis grandan tertremojn kaj viglan polemikon). Ankaŭ Datner, kiu laboris inter februaro 1956 kaj decembro 1969 kiel historiisto en la „Ĉefkomisiono por la esplorado de la hitlerismaj krimoj en Pollando“, kiu estis submetita al la ministerio de la justico, fariĝis iusence viktimo de la nova oficiala historiografia politiko de Pollando, kiu postulis de la historiistoj per forta premo, ke ili kreu bildon pri la pozitiva rolo de la poloj dum la milito, ĉar ili helpis al la judoj (nu, kiel oni scias, tio ja ankaŭ okazis – vd. la liston de la „justuloj inter la popoloj“ de Jad Vašem) kaj pro tio devas esti konsiderataj unuavice kiel kuraĝaj kaj tragikaj herooj. Sed la fifama (kripto)antisemitisma kampanjo, kiu estis lanĉita de la reacia partia funkciulo Mieczysław Moczar, kiu estis rivalo de Gomułka, en 1968, haltigis la planojn de Datner repreni siajn esplorojn pri la holokaŭsto en Bjalistoko kaj kondukis

al ties anticipa demisio de sia posteno kiel direktoro de la menciita Instituto. Do, tragika heroo fariĝis videble antaŭ ĉio li mem.¹

Szymon Datner forpasis la 8an de decembro 1989 en Varsovio kaj estis entombigita en la sama juda tombejo, en kiu ne malproksime de li ripozas ankaŭ L.L. Zamenhof kaj aliaj familioj de la kreinto de Esperanto.

La ĉi-sube prezentita raporto de Datner, kiun mi tradukis al Esperanto, atestas en unika memuara maniero la detalojn de la murdo al la bjalistokaj judoj fare de la germanaj nacisocialismaj fortoj kaj la malfacilajn momentojn de la heroo rezista batalo de la judoj, kiuj provis eskapi la danĝeron de la fizika perejo. La raporto, kiu mencias multajn nomojn de viktimoj, herooj kaj kulpantoj, impresas aparte pro la aŭtenta priskribo de la nekutima brutaleco de la germanoj el la vidpunkto de surloka atestanto de la koncerna tempo kaj laŭ spertoj de la viktimoj mem, kiuj troviĝis en tiu malfacila situacio kun la vana espero, ke la papo en Romo, la Ruĝa Kruco en Ĝenevo aŭ neŭtralaj landoj kiel Svedio savos ilin. Ŝajnas, ke Datner estis perpleksa, konstatante la grandpartan pasivecon de la judaj amasoj, kiuj troviĝis en la geto kaj estis minacataj de la morto kaj senreziste lasis sin transporti de siaj ekzekutistoj kvazaŭ kiel ŝafoj al la ekstermaj koncentrejoj, kie okazis la amasmurdo al la juda popolo de Pollando kaj cetera Eŭropo. La celtrafeco de la epilogo, kiu estas, laŭ klarigo de Datner, kiu verkis la raporton en 1945, plena de kolero kaj malamo kontraŭ la germanaj krimuloj kaj polemike verkita pro doloro pri la mortigo de lia familio, tamen estis kontestata inter la membroj de la eldona komisio-no.

Antaŭmilite, d-ro Szymon Datner estis ankaŭ konata kaj aktiva pola esperantisto, estrarano de Esperanto-Societo 'Zamenhof' ZES en Bjalistoko (1932), kies vicprezidantino estis ankaŭ lia filino Miriam. En 1931 Datner kunlaboris kun la Organiza Komitato de la 2-a Internacia Postkongreso en Bjalistoko. Kvankam postmilito li ne plu aktivis por la Esperanto-movado, Datner ne forgesis la lingvon kaj konservis kontaktojn kun esperantistoj.² Kiel kutime en tiaj kazoj, en naciaj polaj medioj apenaŭ estis konate, ke Datner estis esperantisto, dum en la Esperanto-movado liaj grandaj kaj gravaj prihola-kaŭsta historiografia engaĝiĝo kaj memuara kontribuo ne estis vere konata aŭ aprezata. Dum longa tempo, la verko de Szymon Datner estis ignorata de la scienco, kaj la Esperanto-movado forgesis tiun brilan kaj valoran samideanon.

A. Künzli

Szymon Datner: Batalo kaj neniigo de la Bjalistoka geto

La 16a de aŭgusto 1943 fermas tragikan ĉapitron de la juda historio en la bjalistoka regiono. Temas pri periodo, kiu komenciĝis la 22an de junio 1941, kiu estis karakterizata de nepriskribeblaj suferoj kaj turmentoj kaj kiu finiĝis per la murdo al ducent mil judoj. La germanoj festis plian facilan venkon, kiu signifis por ili plenan venkon en la batalo kontraŭ la juda popolo.

La germanoj ne tuj ekstermis la judojn fizike. Laŭ ilia vidpunkto tio estintus homeca aliro, al kiu la „supera raso de la mastroj“ neniam aparte inklinis. Unue ili suĉis ĉiun vivoforton el siaj viktimoj. Ili humiligis ilin en ties homa digno, ĵetis ilin en la mizeron de la financa ruiniĝo, turmentis ilin per subtila dozado de suferigaj torturoj laŭ ruza maniero, kaj nur poste mortigis ilin. Ili konis neniun kompaton kaj indulgis neniun el ili – nek la bebon en ĝia lulilo, nek la senhelpan maljunulon aŭ virinon

¹ Laŭ la enkonduko de Frank Beer, Wolfgang Benz kaj Barbara Distel kaj la studo de Katrin Stoll (vd. la bibliografion) kun etaj aldonoj de aK.

² Vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Polen.pdf, pp. 153, 155, 156, 157.

– ili ĉiuj estis malamikoj, ili ĉiuj devis esti detruitaj. La germana murdmaŝino funkciis glate laŭ germanaj *akurateco*, *ĝisfundeco* kaj *malhomeco*.

Post kiam la germana armeo konkeris la terenon, ĝi semis morton kaj detruon inter la sendefenda civila popolo. Speciale plukitaj estis la judoj, kiuj estis unue elektitaj por esti ekstermitaj. Kune kun la amasmurdo akriĝis la etoso de la teroro, kies tasko estis subpremi ĉian deziron aŭ provon defendi sin. La orientaj regionoj estis tro grandaj por disponigi sufiĉan kvanton da policistoj. Sed sole la timo antaŭ la policistoj sufiĉis por disciplini la konkeritajn popolojn.

La „Nigra Vendredo“ de la 27a de junio 1941

La eventoj en Bjalistoko post la eksplodo de la german-sovetia milito³ estis detrua bato kontraŭ la judoj. La germanoj okupis la urbon en vendredo, la 27an de junio 1941, kaj debutis per la mortigo de okcent ĝis mil judaj viroj kaj knaboj, kiujn ili bruligis vivantaj en la Granda Sinagogo. Post tio ili estigis incendion en la Szulhojf-o (la kvartalo ĉirkaŭ la Granda Sinagogo) kaj mortpafis preterpasantojn; tiamaniere ili mortigis pliajn mil homojn.

En tiu fatala vendreda mateno granda motorizita unuo de la germanoj koncentriĝis sur la placo Sienny Rynek (ĉe la fino de la Mazowiecka-strato). La germanoj trinkis multe da alkoholo kaj baldaŭ poste ĉirkaŭis la Szulhojf-on en ebria stato.

La masakro komenciĝis je la oka horo matene. La germanoj estis dividitaj en malgrandajn grupojn. Armitaj per maŝinpafiloj kaj mangrenadoj ili unue pelis la judojn tra la mallarĝaj kaj kurbiĝemaj stratetoj ĉirkaŭ la Granda Sinagogo. Sur la stratoj oni vidis la bildojn de Dante el la infero. Ili forpelis la judojn el iliaj domoj, starigis ilin ĉe la muro kaj mortpafis ilin. De ĉiuj flankoj la kompatindaj judoj estis kondukita al la Granda Sinagogo, kiu plene flamis kaj el kies interno aŭdiĝis teruraj korŝiraj krioj. La germanoj devigis siajn viktimojn puŝi la aliajn en la brulantan sinagogon. Kiu kontraŭstaris, tiu estis mortpafita kaj la kadavro estis ĵetita en la sinagogon. Post iom da tempo la tuta kvartalo ĉirkaŭ la sinagogo estis kaptita de la flamoj. La soldatoj ĵetis mangrenadojn en la domojn, kiuj plejparte estis el ligno kaj rapide ekbrulis. La flama maro, kiu ampleksis la tutan Szulhojf-on, disvastiĝis tra la Legionowa-strato, la Suraska-strato kaj la Rynek Kościuszki-placo. Ĝis la malfrua posttagmezo oni pelis la judojn en la brulantan sinagogon, mortpafis ilin sur la stratoj kaj en iliaj domoj. La krako de eksplodantaj grenadoj miksiĝis kun la krakado de la pafoj, la bruo de ebriaj germanoj kaj la korŝiraj krioj de la murditaj viktimoj. La germanoj kondukis 'kavalire' al virinoj. Plej ofte ili ne mortigis ilin, sed devigis ilin per batoj kaj krioj rapide forlasi la brulantan kvartalon; antaŭe ili mortigis iliajn edzojn, fratojn, filojn kaj patrojn antaŭ iliaj okuloj.

Jena kazo montris ilian grandan kavalirecon: Ida Lewitańska, naskita kiel Krywiatycka, estis graveda en la oka monato. Kiam ŝi fuĝis kune kun pluraj aliaj virinoj kaj viroj el la infero de la Szulhojf-o, ŝi renkontis germanojn, kiuj mortpafis proksimume ducent judojn antaŭ la muro de la domo en la Legionowa-strato 9. Maljuna germano vidis la gravedecon de Ida kaj lasis ŝin eskapi. La sinagogo brulis dum pluraj tagoj. Oni devas menciigi ankaŭ jenan incidenton dum tiu „Nigra Vendredo“ de la bjalistokaj judoj: La pola prizorganto de la sinagogo (lia nomo ne estas konata) profitis la mallongan malatenton de la germanoj, malfermis iun fenestron ĉe la malantaŭa muro, tiel ke dekoj da judoj sukcesis forfuĝi, inter ili Pejsań Frajnd, la bofrato de la menciita Ida Lewitańska. Frajnd mortis kelkajn tagojn poste, li estis unu el la „ĵaŭdaj“ viktimoj. En la flamoj de la sinagogo pereis inter alie d-ro Kracowski, kiu estis ĝenerale konata en Bjalistoko, la lamanta apotekisto Polak, la brila ŝakludisto Zabłudowski⁴ kaj la ŝatata distristo Alter Sztajnberg.


La bilanco de la „Nigra Vendredo“ estis ĉirkaŭ dumil mortintoj, la kvartalo Szulhojf forbrulis kaj kun ĝi la sekvantaj stratoj: Chazanowicza, Szkolna, Ciemna, Głucha, Stolarska, Zamojska,

³ Ĝi komenciĝis la 22an de julio 1941 per la atako de la germana armeo kontraŭ la sovetia teritorio kaj finiĝis nur la 8/9ajn de majo 1945 per la senkondiĉa kapitulaco de la germanoj en Berlino.

⁴ Temas pri inĝeniero Morduch Zabłudowski, kiu estis ŝakĉampiono, esperantisto, membro de la Societo Zamenhof en Bjalistoko kaj instruisto de Esperanto en hebrea popollernejo.

Suprasiska, Sucha, Miodowa, Śledziowa, Brzozowa, Bożnicza, Wersalska, Ordynacka. La Rybny Rynek-placo, la Rynek Kościuszki-placo kaj la Legionowa-strato estis forte damaĝitaj.

La „Vendreda Masakro“ ŝokis la bjalistikajn judojn, sed en ne tro fora estonteco ilin atendis eĉ multe pli teruraj spertoj.



Granda Sinagogo de Bjalistoko ĉe la Suraska-strato; dekstre: nuntempa memorialo sur la placo, kie la sinagogo staris (Vikipedio, Große Synagoge Białystok, Wielka Synagoga w Białymstoku).
(Foton de la sinagogo post ĝia bruligo vd. ankaŭ sub <http://www.deathcamps.org/occupation/pic/bigsynagogue.jpg>)
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenzo "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Ĵaŭde, la 3an de julio 1941, okazis nova ĉasado: Ĉirkaŭ tricent judoj, ĉefe intelektuloj, malaperis sen postlasi spuron. Ili fariĝis konataj kiel „Ĵaŭdaj Viktimoj“.

Sabate, la 11an de julio, okazis plia ĉasado, ĉi-foje pli grandskale. Ĉirkaŭ kvar mil viroj kaj knaboj estis transportitaj per kamionoj for de la urbo, kaj kiel evidentiĝis poste, mortpafitaj en Petrasze, ĉirkaŭ du kilometrojn ekster Bjalistoko. Tiuj homoj fariĝis konataj kiel „Sabataj Viktimoj“.⁵

La germanoj trudis al la judoj tributpagon en formo de kvin kilogramoj da oro, dudek kilogramoj da arĝento kaj sovetia mono.⁶

Por humiligi ilin, la judoj estis devigitaj porti flavan kudraĵon sur la vestaĵo. La 1an de aŭgusto oni enfermis ilin en geto.

La *Juda Konsilio*, kiu estis fondita laŭ ordono de la germanoj, fakte havis unumuran funkcion: provizi la germanojn per laboristoj, kiuj estis ekspluatataj senkomplete, kaj helpi al la Gestapo rabi al la judoj ties posedaĵon dum la plena taglumo.

Ekzistas raportoj pri teruraj amasmurdoj fare de lokaj reakciuloj kaj vandaloj, kiuj estis instigitaj de la germanoj en la distriktoj Szczuczyn, Grajewo, Tykocin, Wasilków kaj aliaj pli malgrandaj lokoj.

En aŭtuno 1941 komenciĝis la evakuado de la judoj, kiuj ne kapalis labori, al Pruĵany.⁷ Tio estis terura vojo de la sufero kaj brutaleco. Pli ol ses mil judoj estis deportitaj al Pruĵany kaj loĝigitaj en la domoj de blankrusoj, kiuj estis deportitaj al Germanio por deviga laboro.

⁵ Inter ili troviĝis la fama bjalistoka esperantisto Jakobo Ŝapiro. Ŝajnas, ke temis pri sabato, la 12an de julio, kaj laŭ alia fonto temis pri 5000 personoj.

⁶ Ŝajnas, ke tiuj mezuroj validis por Bjalistoko. Ekzemple en Pruĵany la germanoj postulis de la juda komunumo pagon de 500'000 rubloj, 2 kg da oro kaj 10 kg da arĝento, pagendan en unu tago.

⁷ Lama pola urbo (nomata Pruzana) nuntempe situata en okcidenta Belorusio. La 19an de septembro 1939 Pruĵany estis okupita de sovetiaj trupoj. De la 23a de junio 1941 ĝis la 17a julio 1944 ĝi estis okupata de Germanio. En aŭgusto 1941 la germanoj kreis geton, de kiu la judoj estis deportitaj al la koncentrejo en Aŭŝvico. En Pruĵany, kiu estis preskaŭ tute detruita, mortis ĉirkaŭ 4000 judoj.

Judaj rifuĝintoj el Vilno, kiuj venis al Bjalistoko, rakontis terurajn historiojn pri Ponary⁸ kaj la litovoj. Ŝokaj raportoj alvenis pri la masakro en Slonim de la 14a de novembro 1941.⁹ Murdado, humiligado, rabado, marodado – jen la metodoj de la partianoj de Hitlero kontraŭ la judoj ĝis ilia definitiva neniigo.

La abrupta ŝanĝo de la situacio ŝarĝis la psikon de plej multaj loĝantoj de la juda geto, kiuj estis malesperaj, sed akceptis la sorton kaj senhelpe atendis sian morton aŭ iun miraklon por pluvivi.

Organizado de la armata rezista movado

Sed grupo de junuloj rapide liberiĝis de sia senhelpeco kaj komprenis, ke la sola vojo por agi estas pluvivadi laŭ la instinkto de la nacio, kiu devus dikti al ĝi la batalon kontraŭ la okupantoj. De aŭtuno 1941 grupeto de judaj junuloj reorganizigis kun la celo helpi al miloj da sovetiaj soldatoj, kiuj estis malliberigitaj en la granda koncentrejo por militkaptitoj en la kazerno kaj barakaro de la 10a Ulana regimento. La malliberuloj estis kruele subpremataj, turmentataj kaj malsatigataj. Ili frostiĝis pro la malvarmo, malfortiĝis pro la deviga laboro, kaj multaj mortis. En la geto la judaj gejunuloj organizis tiun agadon kaj sekrete kolektadis vestaĵojn, nutraĵojn, cigaredojn, medikamentojn kaj monon por tiuj malliberuloj. Tiuj, kiuj laboris ekster la geto, transdonis ĉi tiujn donacojn al la sovetiaj soldatoj. Sur la teritorio de la kazerno tion aranĝis Zelik Dworecki, Zelik Iglewicz kaj Abrasza Gerszuni kune kun grupo de aliaj aktivuloj. La subteno de la geta junularo esprimiĝis ne nur per materia helpo. La malliberuloj informiĝis per radioreportoj el Moskvo kaj Anglio pri la okazaĵoj ĉe la fronto kaj tiel ricevis rilatojn kun la ekstera mondo. Estis ankaŭ farita ligo kun la partizanoj, kiuj helpis al multaj malliberuloj fuĝi. La judaj laboristoj en la koncentrejo, kiuj estis dungitaj de la „Oficejo por la konstruado de la germana armeo“, aranĝis kontakton kun la malliberuloj tra inĝeniero Ivanin, kiu estis milita malliberulo, kaj tra la kuracisto de la koncentrejo. La transdonado de informoj kaj donacoj okazis en la keloj de la malsanulejo kaj de la nomita germana Oficejo. Ĉio estis farita sekrete, ĉar iu ajn homo, kiu havis kontakton kun la malliberuloj, estis kondamnita al la mortpuno. Necesis esti singardema ne nur rilate al la germanoj, sed ankaŭ al la informantoj kaj al la anoj de Vlasov¹⁰ kaj eĉ al la judoj, kiuj timis perdi sian propran haŭton. Simila helpo estis organizita ankaŭ en aliaj punktoj de la urbo, kie laboris militkaptitoj kaj judoj. Kontakto kun la malliberuloj de la kazerno de la 10a Ulana regimento ekzistis ĝis la mezo de 1942, do ĝis kiam la laboro en la „Oficejo por la konstruado de la germana armeo“ estis finita.

Laŭ tiu maniero la geto manifestis sian pretecon batali, sed ankaŭ sian simpatian kun tiuj, kiuj estis vivanta simbolo de la postulo respekti la homajn rajtojn kaj kun kiuj ĝi ligis la esperon venki la bestion Hitlero.

Kun la pasado de la tempo la diversaj junularaj grupoj unuiĝis en unusola organizaĵo, la „Kontraŭfaŝisma Komitato“, al kiu apartenis Rywa Szynder, Lejb Mandelblat, Jozzka Kawe kaj aliaj. Al la fondintoj apartenis la maljuna pola komunisto Jakubowski, kiu kaŝis sin en la geto. Ĉi tiu organizaĵo havis kontakton kun alia kontraŭfaŝisma komitato, kiu aktivis ekster la geto kaj al kiu apartenis krom la supre nomita Jakubowski ankaŭ Władysław Nieśmialek, Feliks Lorek, Niura Czewiakowski kaj aliaj membroj.

Ankaŭ la junuloj de la movadoj „Hašomer Haca'ir“ kaj „Hehaluz“,¹¹ kiuj venis el Vilno fine de la jaro 1941, starigis du kolektivojn, kiuj kunlaboris. Ĉiuj tiuj organizaĵoj havis la celon prepari siajn membrojn por armita batalo kontraŭ la germanoj. Bedaŭrinde, dum longa tempo la iniciatintoj ne kapablis unuigi la grupojn en unusola komuna organizaĵo. Tio havis fatalan efikon por la rezista movado en la geto kaj kaŭzis multajn nenecesajn mortojn kaj fine kompletan fiaskon, kies dimension oni estus povinta limigi sub aliaj kondiĉoj.

⁸ Ponary (litovlingve Paneriai), kiu situas dek kilometrojn okcidente de Vilno en Litovio, dum la milito estis amasmortigejo por ĉirkaŭ sepdek mil ĝis cent mil litoviaj judoj.

⁹ En la iama pola urbo Slonim, kiu nuntempe situas en Belorusio, tiam estis mortigitaj ĉirkaŭ 45'000 judoj.

¹⁰ Generalo Andrej Vlasov (1901-46) estis rusa militkomandisto, kiu batalis flanke de la germana armeo. La homoj de Vlasov ne hezitis transdoni fuĝintajn judojn, kiuj volis aliĝi al lia armeo, al la germanoj.

¹¹ Klarigojn vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Hashomer_Hatzair kaj <https://de.wikipedia.org/wiki/Hechaluz>.

La junularo nur malrapide komprenis, ke necesas armata batalo. Unue oni devis akiri armilojn. En la geto mankis armiloj, sed multaj germanaj instalaĵoj ekster la geto havis sufiĉan kvanton. Tiel komenciĝis la kontrabandado de armiloj en la geton. La judaj laboristoj ŝtelis armilojn en la deponejoj, kie la germanoj amasigis rabbitajn varojn. Ili forsegis la fustojn de la pafiloj por faciligi ilian transportadon. La lignajn partojn de la armiloj ili postlasis, sed poste ili aldonis la mankantajn partojn en la lignaĵejo de la geto. Ili kaŝis la armilojn sub la ligna materialo kaj kontrabandis ilin tra la getaj pordegoj. La teniloj de la pafiloj estis metitaj en ŝtalajn stangojn aŭ en kavajn lignajn trabojn.

En la unuaj monatoj de la jaro 1942 la aktiveco de la diversaj junularaj grupoj, kiuj estis penetritaj de la revolucia spirito, intensiĝis. Aperis novaj grupoj, kiuj ne sciis, ke en la proksimeco jam ekzistis aliaj, similaj unuiĝoj kun la sama celo.

Sendube la pliboniĝo de la milita situacio ĉe la fronto stimulis tiujn aktivecojn. Leningrado rezistis la sieĝon. La germanoj estis forpelitaj de Moskvo, kaj la severa vintro kaŭzis al la germana armeo multajn perdojn (interalie mi vidis per propraj okuloj transportojn de malpuraj kaj frostiĝintaj germanoj, kiuj estis infektitaj de afidoj kaj pedikoj kaj estis transportitaj al la lazareto). Ĉiuj tiuj faktoj, kiuj ne estis sekreto por la homoj, kuraĝigis la perditajn judojn malliberigitajn en la geto, kaj signifis por la junularo defion por la batalo. La 1an de majo 1942 aperis afiŝoj kun alvoko por la judoj lanĉi militon kontraŭ la okupantoj.

Konsiderante ĉi tiujn afiŝojn, oni devas rimarkigi, ke la grupoj de la rezisto en principo rezignis pri pli granda diskonigo de siaj agadoj. Oni devas emfazi la malfacilajn kondiĉojn por la disvastigo de ĉiuspeca propagando en la geto. La nepriskribebla etoso de la teroro, la armeo de informantoj pretaj denunci aliajn pro mono aŭ eĉ senpage, la scio, ke ekzistas kolektiva respondeco, kaj la sankcioj, kiuj estis ĝia rekta aŭ akumulita sekvo kaj aplikitaj per krueleco, kiu estis senekzempla en la historio de la homaro – ĉio tio ege malfaciligis la laboron de la rezistaj grupiĝoj kaj malhelpis ankaŭ ilian ekspansion al amasmovado. Ĉiu signo de ribelo aŭ batalo povis rezultigi la partan aŭ kompletan likvidon de la geto. Se oni ne spertis la realecon de la geto, oni ne forgesu ĉi tiujn faktojn, kiam oni kelkfoje demandas sin, kial la judoj ŝajne tiel facile konsentis esti senditaj al la morto sen ĉia rezisto.

En printempo kaj somero de 1942 la geton atingis onidiroj, ke la germana teroro furoras en Varsovio kaj en ĉiu regiono de la Ĝenerala Gubernio.¹² La onidiroj koncernis la batalojn de la pola subtera movado kaj la fondon de la Pola Laborista Partio, kiu alvokis al armata batalo kontraŭ la okupantoj, same la intensigon de la partizanaj atakoj en la regionoj de Kielce kaj Lublino. Tiu novaĵo kuraĝigis la batalantojn de la rezistado en la Bjalistoka geto, sed la problemoj de la komunikado kaj la manko de taŭgaj aktivuloj por la ribela movado en la bjalistoka regiono devigis la getanojn fidi nur la proprajn fortojn, kiuj estis limigitaj.

La unua duono de la jaro 1942 pasis relative trankvile. Ŝajnis, ke en la vivon de la judoj revenis certa stabileco, kvazaŭ la germana monstro trinkis sufiĉe da sango. La sciigo pri la „operaco“ en la Varsovia geto de la 22a de julio 1942,¹³ la plej granda juda centro en Eŭropo kun pli ol duonmiliono da homoj, trafis ilin kiel tondro dum klara tago. La mistero, kial la judoj estis deportitaj el siaj loĝlokoj kaj urbetoj kaj rekoncentritaj en pluraj grandaj getoj, estis malkaŝita.

Ne temis pri la „malpliigo de la danĝera influo de la judoj al la nejudaj ĉirkaŭaĵoj“, kiel la germanoj konstante asertis kaj kiel iuj judoj kredis aŭ volis kredi. Nun evidentiĝis, ke la celo de la koncentrado de la judoj estis teknike faciligi la mortigon de la juda loĝantaro. Tiu vero ne penetris en la konscion de tiuj, kiuj respondecis por la sorto de la judoj, kiuj estis malliberigitaj en la getoj. Povas esti, ke la patroj de la Juda Konsilio ne volis vidi la veron kaj preferis kaŝi ĝin antaŭ la amasoj.

La juda junularo en la geto, organizata en la Komsomolo (Unuiĝinta Komunisma Junularo), en „Hehaluz“ kaj „Haŝomer Hacair“ kaj kiu ne estis koruptita de la vastaj alkoholismo kaj prostituado en la komunumo, reagis al la novaĵoj el Varsovio per pli forta rekrutado de sanaj kaj bonkonduktaj membroj por siaj vicoj, kiuj komprenis la neceson de la batalo.

¹² Pri tiu teritorio vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĝenerala_Gubernio.

¹³ Ekde tiu tago la Varsovia geto estis „likvidita“ de SS paŝon post paŝo kaj la loĝantoj deportitaj al diversaj ekstermejoj, precipe al Treblinka.

Multaj aliĝis al la rezista movado libervole, naŭdek naŭ procentoj de ili estis junuloj de ambaŭ seksoj kaj de ĉiu politika tendenco. La plej multaj maljunuloj venis el la vicoj de la Komunisma Laborista Partio (Judyta Nowogródzka,¹⁴ Rywa Szynder, Jozzka Kawe, Adela Herc, Mietek Jakubowicz, Lejb Mandelblat, Welwł Wołkowyski¹⁵ kaj aliaj).

La kontrabandado de armiloj en la geton estis fortigita, sed mallongan tempon poste evidentiĝis, ke tio povas esti nur parta kaj nesufiĉa solvo de la problemo de la armado. Nun oni intense serĉadis fakulojn, kiuj povis produkti ĉiuspecajn armilojn. La malgrandaj metiejoj estis provizitaj per fidinda personaro por la produktado de mane faritaj grenadoj. Kemiistoj miksis eksplodaĵojn kaj plenigis botelojn kaj ampolojn per kaŭstikaj acidoj (plejparte vitriolo). Oni produktis longajn kaj mallongajn pafilojn. En la laborejoj de la forĝistoj kaj seruristoj estis produktitaj mankantaj pecoj, batingoj kaj longaj ŝtalaj tranĉiloj.

Informado kaj informiĝo

La kontraŭleĝa politika informado kaj informiĝo ludis gravan rolon por la rezista movado en la geto. Al la judoj estis malpermesate aĉeti aŭ legi germanajn gazetojn, sed ekzistis miloj da ebloj akiri ilin de ekstere, kaj delonge ili estis vendataj je multe tro altaj prezoj sur la stratoj de la geto. La judoj legis ĉefe *Białostoker Zeitung*, *Das Reich*, *Preußische Zeitung* kaj *Königsberger Allgemeine Zeitung*, pli malofte ankaŭ *Deutsche Allgemeine Zeitung*, *Völkischer Beobachter* kaj aliajn. Ili provis ekscii el la gazetaro, ĉu la falo de la germanoj, pri kiu ili tiom sopiris, baldaŭ okazos.

Preskaŭ ĉiuj opiniis, ke la malvenko de la germanoj estas garantiata. La sola malklara afero estis, ĉu la loĝantoj de la geto restos vivaj ĝis la liberiĝo, kaj tio deprimis ilin. Kun retenata spirado ili sekvis la sorton de la heroo batalo ĉe Stalingrado kaj la evoluon de la batalo en Libio. Ili flustris kun zorgo pri El Alamein, ĉar la sorto de la judoj en Palestino dependis de la rezulto de tiuj bataloj. Ili legis atenteme inter la linioj, informiĝis en la fabrikoj, hejme kaj surstrate pri la politikaj okazaĵoj kaj disvastigis la plej absurdajn onidirojn, kvazaŭ tiuj eventoj vere okazis. Datoj antaŭdirantaj la militfinon havis konjunkturajn, kaj kiam ili pasis, la amasoj daŭre kredis ilin, ĉar ili plu esperis. Kiam pli kaj pli da eŭropa sango estis verŝita de la germanoj, ĉar partoj de la juda popolo estis ekstermitaj unu post la alia kiel branĉoj de arbo, kiuj estis distranĉitaj de sia trunko, kiam la judoj plene konsciiĝis, ke ili restis vivaj nur por atendi sian likvidon, alvenis la kompreno, ke por establi „Novan Eŭropon“ kaj „novan eŭropan ordon“ devos esti oferata ne nur la vivo de viroj kaj virinoj, sed ankaŭ tiu de judaj infanoj. Pro tio la geto troviĝis en konstanta stato de ekstrema nervozeco, memorante la terurajn batojn de la antaŭa tago kaj ĉiutage senĉese timante la kompletan detruon. Kaj tiel fariĝis tre facile akcepti ion ajn neracian kaj nekomprenblan, kvazaŭ ĝi estus vera.

Fakte ĉiuj gazetaj artikoloj, kiuj raportis pri judaj aferoj, aparte interesis ilin. Sed la judoj havis la iluzion, ke la germana politiko rilate al ili povus ŝanĝiĝi, ke la hitlera reĝimo revizios sian malhomecan starpunkton, tiel ke la originala plano de la totala ekstermado estos ŝanĝita. Kun aparta intereso la judoj legis la semajnajn artikolojn de Goebbels en *Das Reich*. Sed la objektiva pritakso de tiuj artikoloj ne kaŭzis optimismon, kaj la malmultaj publikigitaj paroladoj de Hitlero mem montris signon, ke li cedos. La parolado, en kiu li minacis sen miskompreno, ke „ĉe tiuj judoj, kiuj ĉiam ridis, la ridado frostiĝos sur la vizaĝoj“, lasis al ili aparte ŝokan impreson.

Malgraŭ tio, aŭskulti la radion disvastiĝis inter judoj. La laboristoj ekster la geto aŭskultis la radion en siaj diversaj germanaj fabrikoj. Judinoj, kiuj laboris en germanaj hejmoj, aŭskultis la radion kiam ilia regado iris en la urbon. En la geto mem, ili aŭdis elsendojn de radioj konstruitaj de amatoraj teknikistoj. Preskaŭ ĉiu junulara grupo havis sian propran radion. La aparatoj estis kaŝitaj en subteraj


¹⁴ Datner kaj la viroj, kiuj fuĝis en majo 1943 el la geto, apartenis al ŝia grupo.

¹⁵ En la germana traduko troveblas jen la formo Wołkowysk(i), jen Wolkowysk(i). Probable temas pri la toponimo Wołkowysk, urbo iam aparteninta al Pollando kaj hodiaŭ situata en Belorusio (beloruse Ваўкавыск, do Waŭkawysk; ruslingve Волковыск, litove Valkaviskas). Kiel pola judo Datner tendencis, laŭ pola prononca kutimo, utiligi la polan ł, transkribante baltslavajn kaj judajn nomojn kiel ekzemple Welwł. Tiu transliterumo ne estas regula aplikata en la teksto, sed mi konservas la versiojn de la germana traduko, kiu konformas al la pola originalo, kaj ĝi koncernas ankaŭ aliajn literojn aŭ literajn kombinojn kiel ekz. sz (ŝ). Sed ekzemple la nomon Ha' Shomer Ha' Tzair aŭ simile mi adaptis al la kutima Esperanta skribmaniero aŭ fonetiko. (aK)

kaŝejoj. Novaĵoj estis disvastigitaj en specialaj bultenoj, cirkulitaj en specialaj bultenoj, cirkulitaj en specialaj bultenoj, kaj prezentitaj ĉe grupaj kunvenoj. Ankaŭ estis informantoj. Loĝposedanto sur strato Jurowiecka estis mortpafita laŭ raporto de informanto post kiam radio tie troviĝis.

La radio ludis eĉ pli gravan rolon ol la gazetaro por akiri informojn en la geto. Posedi radion kaj aŭskulti la novaĵojn estis malpermesate al la ne-germana loĝantaro – alikaze minacis la mortpuno. Malgraŭ tio, aŭskulti radion multe disvastiĝis inter judoj. La laboristoj ekster la geto aŭskultis radion en la diversaj germanaj entreprenoj. Judinoj, kiuj laboris en germanaj domoj, aŭskultis radion, kiam la mastroj forestis en la urbo. En la geto mem oni aŭskultis diversajn elsendojn el radio-aparatoj, kiuj estis konstruitaj de amatoraj teknikistoj. Preskaŭ ĉiu junulara grupo havis sian propran radio-aparaton. La aparatoj estis kaŝitaj en subteraj kaŝejoj. La novaĵoj estis disvastigitaj en specialaj bultenoj kaj laŭlegitaj dum grupaj renkontiĝoj. Sed oni riskis esti denuncita. La posedanto de iu loĝejo en la Jurowiecka-strato estis mortpafita, ĉar li estis denuncita de raportanto, post kiam tie oni trovis radio-aparaton.

La trankvilecon de la unuaj dek monatoj de 1942 malkvietigis raportoj pri teruregaj masakroj, kiuj okazis dum la detruo de la geto en Slonim, same la onidiro, ke dek judaj kuracistoj kaj apotekistoj estis mortpafitaj en Wołkowysk en aŭgusto 1942. Ambaŭ okazaĵoj estis ligitaj kun la daŭra juda subteno al sovetiaj partizanoj.



Mapo de la Bjalistoka geto en 1941-43 (fonto: https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Białystok_Ghetto.svg)
(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenzo "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

(1 - muroj, 2 - pordego, 3 - fabrikoj, 4 - Gestapo, 5 - Juda Konsilio)

Alia mapo estas trovebla sub: <https://encyclopedia.ushmm.org/content/en/map/bialystok-ghetto-1941-1943>

Detruado kaj likvido de la Bjalistoka geto, deportado de la judoj

En novembro 1942 la geto travivis malfacilajn tagojn. La 2an de novembro komenciĝis la detruado de la getoj en la bjalistoka regiono, kun escepto de la getoj de Bjalistoko, Jasionówka kaj Grodno. En tiu lunda mateno la SS-anoj ĉirkaŭis la getojn, forpelis la sensciajn judojn el iliaj domoj, koncentris ilin sur

publikaj placoj kaj foirejoj kaj poste metis ilin sur antaŭe konfiskitajn ŝarĝkamionojn, turmentante la sendefendajn homojn, kaj veturigis ilin al koncentrejoj en Kielbasin, Boguszewo, Zambrów, Wołkowysk kaj al la kazerno de la 10a Ulana regimento proksime de Bjalistoko. De tie la malmultaj postvivantoj (ĉar la plimulto antaŭe mortis pro malsato, malsanoj kaj malhomeca traktado) veturis per la fervojo al la okcidenta direkto. Sed ne malproksime al okcidento. En la monatoj januaro ĝis marto 1943 ĉirkaŭ cent tridek mil judoj el la bjalistoka regiono pereis en la „banejoj“ kaj fornoj de Treblinka.¹⁶ Nur malgranda grupo saviĝis, kiu aŭdacis kontraŭstari la ordonon aperi en la kolektejoj. Ili fuĝis al la arbaro, kie la plimulto pereis pro malsato kaj malvarmo aŭ pro la kugloj de germanaj policistoj aŭ pro iuj lokaj persekutantoj aŭ anoj de NSZ,¹⁷ kiuj estis rekrutitaj de la germanoj. La malpli kuraĝaj homoj ĉesigis sian vivon per suicido. Nur tre malmultaj judoj sukcesis kaŝi sin en la Bjalistoka geto.

La tragika situacio de la judoj, kiuj kuraĝis fuĝi, malboniĝis pro la nepriskribebla teroro de la germanoj kontraŭ la pola loĝantaro. Ili minacis bruligi iliajn domojn kaj mortigi ilin, se ili kaŝas fuĝintajn judojn. Ekzistis ankaŭ aliaj kialoj. En grandaj partoj de la pola socio regis etoso de malamo, post kiam la ultra-naciisma partio „Narodowa Demokracja“,¹⁸ la faŝisma rabista partio „Obóz Narodowo-Radykalny“¹⁹ kaj la faŝisma „Sanacja“²⁰ sisteme kaj senpune influis la socion dum jaroj. Rilate al la judaro ekzistis granda malamo, kiu ekestis longe antaŭ la milito – per senĉesa endoktrinado, kiu alvokis al ekonomia kaj socia bojkotado. Tio estis akcelita per tumultoj kaj ĉikanaj en universitatoj kaj altlernejoj,²¹ kiuj estis lanĉitaj de kanajloj kun akademiaj ĉapo, krome per rasismaj klaŭzoj en la leĝo kiel la fama malpermeso de la „ŝoĥtado“ laŭ sinjorino Prystorowa²² aŭ per la fifama „jeso“ de generalo Sławoj Składkowski²³ kaj ties bojkotaj taĉmentoj.

Kontraŭ tia kruela malamiko kiel la germanoj kaj kontraŭ la pola loĝantaro, kiu mem suferis grandajn perdojn pro la germana teroro, apenaŭ ekzistis ŝanco savi la judojn en Pollando per grandskala operaco. Sed la procentaĵo de postvivintaj judoj povintus esti sendube pli granda, se la etoso rilate al la judoj estintus pli amika. Tia etoso de la malamo ne estus ekzistinta, se la Sanacja-reĝimo ne estus ‘amikiĝinta’ kun la germanoj, ne estus lojale respektinta la konvencion de 1934 kaj ne estus aplikinta ĉiujn paragrafojn, kiuj ne estis konformaj al la leĝo kaj kiuj formiĝis el la spirito de tiu konvencio.²⁴

Jena mirinda escepto devas esti menciita: La parto de la pola intelektularo, kiu flegis la tradicion de la libereco kaj ribelado de multaj jaroj, sed ankaŭ centoj da poloj, homoj kun bona intenco vaste vivantaj tra la lando, precipe kamparanoj, homoj kun morala kuraĝo, kiuj kaŝis judojn malgraŭ propra risko aŭ okupiĝis pri tiuj, kiuj estis persekutataj kiel bestoj, meritas plej altan agnoskon, kiu iutage povus esti nomita „premio por homeco“. Multaj centoj da judoj en la bjalistoka regiono ŝuldas sian savon kaj postvivadon unuavice al la kuraĝo, sinofero kaj kompatado de tiuj polaj kamparanoj.²⁵ (Iliaj nomoj iam

¹⁶ Inter julio 1942 kaj aŭgusto 1943 en la gasĉambroj de la ekstermejo de Treblinka estis mortigitaj ĉirkaŭ okcent mil judoj kadre de la „operaco Reinhardt“ (vd. <http://www.planlingvoj.ch/Treblinka.pdf>)

¹⁷ La anoj de Narodowe Siły Zbrojne (Naciaj Defendaj Fortoj) estis kontraŭ-komunisma pola subtera organizaĵo.

¹⁸ ND (Nacia Demokratio), kiu estis fondita en la fino de la 19a jarcento, estis konservema, kontraŭ-komunisma pola movado, kiu celis konstrui katolikan Pollandon.

¹⁹ ONR (Naci-radikala Tendaro) estis dekstrema, naciisma kaj kontraŭ-komunisma partio, kiu estis malpermesita kelkajn semajnojn post sia fondiĝo en 1934. Anoj de tiu movado partoprenis en diversaj rezistaj agadoj dum la germana okupacio.

²⁰ Sanacja (Kuracado) estis la nomo de la gvida pola registara movado sub Józef Piłsudski inter 1926-29. (Nu, Piłsudski mem ne estis faŝisto aŭ antisemito; li apartenis al la maldekstra politika tendenco, kvankam li estis kontraŭ la komunismo kaj Sovetunio. Male, lia kontraŭulo Roman Dmowski, kiu gvidis la movadon „Endecja“, estis radikala antisemito).

²¹ Al kiuj apartenis „benkaj getoj“, Numerus clausus kaj Numerus nullus.

²² En 1935 la deputitino Janina Prystorowa faris leĝproponon, kiu devis komplete malpermesi la ŝoĥtadon laŭ juda rito. En marto 1936 la Sejmo fakte akceptis reviziitan version, kiu antaŭvidis iujn esceptojn.

²³ Pola divizia generalo, kuracisto kaj politikisto de Pollando, lojalulo de Piłsudski, 1936-39 ĉefministro de Pollando (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Felicjan_Sławoj_Składkowski). La „jeso“, kiun Datner aludis, rilatas al la leĝo de la 31a de marto 1938 eldonita de la ministerio de la internaj aferoj de Pollando (kies ĉefo estis Sławoj Składkowski), kiu antaŭvidis la eblon de la ekscivitanigo de polaj ŝtatanoj, precipe en la kazo, se la concerna persono dum kvin jaroj ne havis rilaton kun Pollando. Tiu leĝo concernis precipe polajn judojn, kiujn la registaro en Berlino forpelis de Germanio kaj resendis al Pollando. Ankaŭ la registaro en Varsovio ne volis havi tiujn judojn (vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Polenaktion>).

²⁴ Probable temas pri la German-pola Traktato de la 26a de januaro 1934 (nomata ankaŭ Piłsudski-Hitler-Pakto), kiu devis ekskludi reciprokajn atakadon. Sed Hitlero nuligis tiun pakton en la 28a de aprilo 1939 (vd.

https://de.wikipedia.org/wiki/Deutsch-polnischer_Nichtangriffspakt). Post la morto de Piłsudski en 1935, Edward Rydz-Śmigły, marŝalo de Pollando, klopodis teni ‘amikajn’ rilatojn kun la germanoj, sed de marto 1939 li sentis la germanan minacon pli kaj pli klare. La 1an de septembro 1939 Pollando estis atakita kaj okupita de la germana armeo.

²⁵ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Recenzo_Raszkin_Miastelo.pdf.

estos gravuritaj per oraj literoj en la historio de la pola nacio, sed dume iliaj nomoj ne povas esti malkaŝitaj, nek tiuj de la savitaj judoj, ĉar iuj el ili daŭre estas persekutataj de NSZ kaj kelkaj eĉ jam pagis por sia grandanimeco per la propra vivo.)²⁶

Post la neniigo de la aliaj getoj restis nur la Bjalistoka geto kun sesdek mil homoj kaj la Lodza geto kiel plej lastaj judaj insuloj en la maro de la detruado kaj kiel tombejoj de la polaj judoj. Kiom longe ?

Dubindaj onidiroj, trompaj kredoj kaj falsaj asertoj

Ĉi tiu demando konfuzis infanojn, plenkreskulojn kaj maljunulojn. La hororo, kiu estis ligita kun la nomo Treblinka, estis konata al ĉiuj. Flugfolio pri Treblinka, kiu estis eldonita de la pola subtera organiza movado en Varsovio kaj multobligita kaj distribuita en la geto fine de la jaro 1942, kaŭzis nepriskribeblajn timon kaj teruron. La seka kaj faktoriĉa priskribo de la „banejoj kaj kamentuboj“ ŝokis tutan Bjalistokon. La sekreto estis malkaŝita, kie restis la transportoj kun centmiloj da „evakuitaj“ judoj el la Varsovia geto, kiuj estis deportitaj por „labori en la oriento“. La enigmo de la duonmiliono da judoj, kiuj malaperis en la regiono inter Varsovio kaj Maĥinia,²⁷ estis solvita. La flugfolio celis la polan publikon kaj informis ĝin pri la konstruado de la gigantaj fornoj: Kremaciejoj, en kiuj baldaŭ ankaŭ poloj estu neniigitaj. La manifesto finiĝis per alvoko al armata batalo kontraŭ la germanaj invadintoj.

La fermitajn getojn iom post iom penetris raportoj pri lokoj, al kiuj judoj laŭdire estis transportitaj por labori, sed neniu vidis iun ajn homon reveni de tie. Majdanek, Aŭŝvico, Bełżec,²⁸ Minsko estis nomoj, kiuj kaŭzis inter judoj sentojn de hororo. Pri tiuj lokoj oni rakontis unu al la aliaj nekredeblajn monstraĵojn, kiuj fakte okazis kaj ke tiuj lokoj estis centroj de la turmentado por judoj el tuta Eŭropo. La judoj en Bjalistoko, kiuj memoris la „Aŭtodafeon“²⁹ **ne malproksime de la bjalistoka foira placo** en la tago, kiam la germanoj okupis la urbon, kaj la „Ĵaŭdajn“, kaj „Sabatajn“ viktimojn, sed kiuj ankaŭ sciis pri la masakroj de Slonim kaj Vilno, ne havis iluziojn pri tio, kio ankoraŭ sekvas. Kaj tamen la „prudentaj“ kaj optimismaj judoj rifuzis kredi, ke en la mezo de Eŭropo povas ekzisti certaj lokoj destinitaj por la amasmurdo.

La samaj homoj, kiuj konfesis la faktojn de la publika amasmurdo, asertis, ke se la germanoj intencus mortigi ĉiujn judojn, ili ne hezitus fari tion tuj kaj sen prokrasto. Kiun kialon ili havis por organizi kaj kontroli transportojn. Kial uzi rimedojn kaj fortojn, kiuj povis esti utiligataj pli bone ĉe aliaj frontoj? Pri la abomenaj kruelaĵoj plenumitaj ĉe la judoj kulpus la soldatoj, kiuj volus „amuziĝi“ kaj eskapis la kontrolon de siaj ordonantoj, precipe ĉe la milita fronto (la germanoj efektivigis la amasmurdon tuj post sia alveno en la urbo).

La aserto, ke la kontraŭjuda propagando kaj kompleta neniigo de la judoj malmulte rilatis unu al la alia, konvinkis multajn homojn. Estis tre malfacile kontroli la faktojn, kiuj penetris en la geton el foraj lokoj. La kontakto kun la mondo ekster la geto estis tre malfacila kaj vivdangera. La magraj novaĵoj, kiuj atingis la geton, povis esti veraj, sed ankaŭ falsitaj.

La unuaj dek monatoj de la jaro 1942 pasis relative trankvile kaj efikis, ke la judoj de la bjalistoka regiono revis pri pozitiva estonteco. Sed la konstantaj malbonaj novaĵoj kaj la rakontoj pri „operaco“ en la Ĝenerala Gubernio, en Belorusio kaj Ukrainio estigis pli kaj pli da duboj.

Preskaŭ sola temo en la loĝejoj de la getaj loĝantoj kaj ĉe iliaj laborlokoj estis, ĉu ili postvivos la militon. Raportoj pri kvereloj kaj laŭdiraj opiniaj diverĝoj inter la germana armeo, nazia partio kaj la Gestapo vekis grandajn esperojn, kvankam ili ne trafis la esencon. Multaj homoj kredis, ke la germanaj

²⁶ De 1953 la israela ŝtato honoras elektitajn personojn el diversaj landoj, kiuj savis aŭ protektis judojn dum la nacisocialisma tempo (1933-45) je propra risko, kadre de la listo „Justuloj inter la popoloj“. Ĝis nun pli ol 6500 poloj ricevis tian honorigon.

²⁷ Stacidomo en orienta Pollando, kie interkruciĝas du ĉefaj fervojaj linioj kaj de kie la vagonaroj kun la deportitaj judoj el Varsovio kaj aliaj polaj urboj estis direktitaj al la koncentrejo de Treblinka.

²⁸ Kune kun Treblinka plej teruraj koncentrejoj de la germanaj nazioj en la Ĝenerala Gubernio sur pola teritorio, kie la judoj estis ‘industriecce’ mortigitaj ĉefe per pafado, batado kaj gasa sufokado.

²⁹ La aŭtodafeo estis katolika religia ritualo, kiu estis aplikata de la Inkvizicio dum la efektivigo de ĝiaj verdiktoj, kutime per bruligado de la viktimoj sur la ŝtiparo.

perdoj en oriento, la kreskanta atendo, ke malfermiĝas dua fronto en okcidento, kaj la kreskanta verŝajno de definitiva germana malvenko kaŭzas krizon ĉe la fronto, ĉar la soldatoj amase ribelos. Ili ankaŭ kredis je revolucio 'de supre', kiu povus konduki al tio, ke la regado povus esti transdonita al la militistaro, kiu senpotencigus Hitleron kaj finus la politikon de la amasa neniigo de la konkerita loĝantaro (politiko, por kiu la germanoj pagus altan prezon en la kazo de milita malvenko). Oni imagis, ke la militistaro iniciatus politikan ŝanĝon kaj restarigus la homajn rajtojn al tiuj, de kiuj ili estis forprenitaj de la nacisocialistoj. Sed ili eraris kredante, ke malmultan tempon post eventuala armea puĉo pactraktato estos subskribita kaj ke tiam ili estos savitaj kaj ke la restaĵoj de la turmentita juda popolo povos postvivi. La kredo je baldaŭa germana milita malvenko kaj ĉefe je la morala pliboniĝo de la germana popolo, kiu en la pasinteco havis la gvidan pozicion en la familio de la kulturitaj popoloj, akompanis la bjalistokajn judojn ĝis la plej lasta tago de la definitiva ekstermado. Eĉ en la mortotrajnoj survoje al Treblinka kaj Majdanek multaj judoj kredis, ke oni fakte sendas ilin al iu laborlagro, kiel la germanoj daŭre anoncis, kaj ne pensis, ke ilia trajnveturo kondukos ilin al ilia morto. **Pri** kio ili kulpis? Kial la verdikto por ili estis la mortpuno ?

La pesimistoj en la geto kredis je la falo de la germanoj kaj supozis, ke la germana armeo disrompiĝos en la profunda interno de Ruslando (en la momento de la likvido de la geto la frontlinio troviĝis ĉirkaŭ okcent kilometrojn oriente de Bjalistoko). Sed ili ankaŭ avertis, ke la Gestapo havas ankoraŭ sufiĉe da tempo por likvidi la ceterajn judojn – kiel nedeziratajn atestantojn. Ili atentigis ankaŭ pri tio, ke estas malfacile vidi laŭdirajn diferencojn inter la Gestapo kaj la armeo, ĉar finfine estis la germanoj, kiuj, okupinte Bjalistokon, jam en la unua tago bruligis mil judojn en la Granda Sinagogo, amase pafis aliajn judojn kaj poste aranĝis grandan ĉaspersekutadon kaj turmente murdis kvin mil viktimojn en la „Ĵaŭdo“ kaj „Sabato“. Ĉiuj tiuj krimoj ne estis faritaj de la Gestapo, kiu en tiu momento ankoraŭ ne troviĝis en la urbo, sed de la armeo mem. Estis malfacile imagi, ke Hitlero kiel kompetenta organizanto ne okupos la plej gravajn postenojn de la ĉefkomandejo de la germana armeo per propraj homoj. Krome, oni atentigis pri la tipa pensmaniero de la germanoj, kies psikologio kutimas al blinda obeado kaj strikta plenumo de ordonoj sen demandi, kiu donis la ordonon kaj kiu estas la morala fono de la persono, kiu donis ĝin.

La reprezentantoj de la geta inteligencio analizis la situacion tre detale kaj ofte kuraĝigis unu la aliajn per la konsolo, ke ekzistas fortoj, kiuj ne partoprenas en la militaj klopodoj kaj devas esti respektataj de la germanoj; sendube, tiuj fortoj intervenus favore al la judoj en Eŭropo, kiuj estas kaptitaj de la manoj de Hitlero kaj kiujn minacas pereco. Ili atentigis pri la enorma aŭtoritateco de la papo kaj de la Internacia Ruĝa Kruco, de la neŭtralaj landoj, kun kiuj Germanio havis diplomatiajn kaj ekonomiajn rilatojn. Grandan efikon havis la ordono de la Gestapo, ke ĉiuj judoj kun nepola kaj nesovetia ŝtataneco registriĝu. Ili supozis, ke tio servus al la interŝanĝo de germanaj militkaptitoj en la anglalingvaj landoj. Fakte pluraj dekoj da homoj registriĝis, sed tio ne helpis al ili. Estis granda surprizo, kiam iu judino kun du infanoj ricevis la permeson vojaĝi al sia edzo en Palestino. Oni konkludis, ke la eksterlandaj judoj ne forgesos ilin kaj faros ĉion por savi ilin. Delonge en la geto disvastiĝis la onidiro, kies origino estis nekonata, ke ĉiuj judaj infanoj baldaŭ estos transportitaj kune kun siaj patrinoj al Svedio kaj ke sveda delegacio kaj reprezentantoj de la Ruĝa Kruco jam estas survoje al ili. Oni rakontis amuzan historion pri iu sinjorino, kiu reagis tre ĉagrenite, kiam oni sciigis al ŝi, ke ŝi translokiĝos, post kio ŝi anoncis, ke ŝi volas resti – „ĉar kio okazus al ŝia posedaĵo?“ Sed tia delegacio neniam alvenis. La judoj vane atendis antaŭ la kontraŭleĝaj radio-aparatoj kondamnon de la teruraj krimoj faritaj kontraŭ la senhelpaj homoj, kiuj atendis sian saviĝon. Ankaŭ el Romo venis neniun verdikto,³⁰ en Ĝenevo oni ne protestis kaj la neŭtralaj ŝtatoj faris neniun diplomatan intervenon. La voĉoj de tiuj, kiuj estus povintaj savi centmilojn da infanoj, silentis.

En aŭtuno 1942 en la geto cirkuladis la onidiro, ke la „praktikemaj“ germanoj utiligos la grason de la judoj post ilia mortigo por produkti sapon. Ĉiu flustris al la alia, ke en la germana sapo, kiu estis uzata en la geto, troviĝas granda porcio da juda graso. La deklaraĵo pri tiu sapo nomiĝis „Rif“, ĉar tiu vorto estis tradukita kiel mallongigo por „pura juda graso“.³¹ Kelkaj judoj ŝercis pri tio, dum aliaj eĉ

³⁰ Al papo Pio XII (Eugenio Pacelli) oni riproĉis, ke li publike prisilentis la tragikan sorton de la judoj dum la nacisocialisma tempo kaj restis pasiva por savi ilian vivon dum la dua mondmilito kaj la holokaŭsto.

³¹ Germanlingve „reines jüdisches Fett“, mallongigo de „Reichsstelle für industrielle Fette“ (Regna oficejo por industriaj grasoj).

kredis ĝin, kaj ĉiuj estis deprimitaj. Sento de grava malĝojo kaptis ĉiujn judojn pro la malcerteco pri la diablaj planoj de la germanoj kaj pro la timo pri tio, kio sekvas en la venontaj tagoj.

Reorganizado de la rezista movado

La onidiroj pri Treblinka kaj la aliaj ekstermejoj same kiel pri la likvido de la getoj en la provinco akcelis la decidon kunigi ĉiujn fortojn de la rezista movado en la geto de Bjalistoko. Unue la marksismaj grupoj „Hašomer Hacair“ kaj la „Unuiĝo“³² unuiĝis sub komuna gvido. Iom poste estis fondita la bloko „B“ el la unuiĝo de "Hehaluz", „Dror“, „Hanoar Hacioni“, „Beitar“ kaj „Hašomer Hacair“. La ĉi-lastaj membris en ambaŭ organizaĵoj kaj servis kiel ligilo inter ili. La interparoloj pri la unuiĝo de tiuj du organizaĵoj daŭris malrapide pro ideologia doktrineco kaj personaj ambicioj. Tiuj estis la ĉefaj kialoj por la fiasko de la rezista movado dum la „unua operaco“ en la Bjalistoka geto en februaro 1943.

Intertempe ambaŭ blokoj komencis febrajn klopodojn por armadi la proprajn membrojn. Ili kontaktis iujn germanojn, ĉe kiuj ili akiris armilojn. Ĥajka Grossman,³³ Bronia Winicka, Buba Rubinsztajn kaj Maryla Różycka, kiu poste servis kiel kuraĝa kuriero ĉe la partizanoj, apartenis al tiu grupo. La ĉefa armila depono troviĝis ĉe Szolem Korzec en la Ciepla-strato. Li organizis ankaŭ la aŭskultadon de radio-elsendoj ĉe Szalom Obiedziński, kiu estis instruisto pri matematiko el Grajewo (kaj pereis en la vicoj de la Ruĝa Armeo en 1944). La ĉefa produktejo por armiloj kaj mangrenadoj estis direktita de inĝeniero Henoĥ Farber en la kelo de lia loĝejo en la Ciepla-strato 8.

La rekrutado de la grupanoj, kiu estis farita kun plej granda singardo (ĝis la likvido de la geto okazis eĉ ne unu perdo), kreskigis la nombron de batalantoj. La geto estis dividita laŭ sektoroj kaj ĉiu sektoro laŭ blokoj, kiuj siavice dividiĝis laŭ malgrandaj unuoj de po tri domoj. La membroj de la rezistaj grupoj ekzercadis la utiligon de pafarmiloj. Oni kontaktis polojn kaj rusojn ekster la geto por starigi komunan gvidantaron kontraŭ la okupantoj. Unu el tiuj kontaktoj estis malkovrita, kiam la germanoj hazarde malkaŝis la sekretan organizaĵon de sovetiaj oficiroj en la Cygańska-strato; tie post vigla pafado estis mortigita la stabo de la organizaĵo, kaj grandparto de la armiloj estis forprenitaj el ĝia depono. Dum ĉi tiu operaco pereis Sybirak, la kuraĝa komandisto de la partizanoj de Białowieża. Estis kreita ligo kun la polaj dungitoj, kiuj laboris en la pasporta sekcio de la loka administrejo. Tiel, multaj „arjaj paperaĵoj“ estis akiritaj por la membroj de la judaj organizaĵoj. La batalantoj ricevis kalian cianidon, kiun ili devis gluti, se ili estos kaptitaj de la germanoj; per tio oni volis eviti, ke ili estos turmentataj.

Kune kun la fortigo de ilia memdefendo naskiĝis la ideo forlasi la geton laŭ grupoj de partizanoj kaj batali en la arbaroj kontraŭ la okupantoj. Ĉi tio kaŭzis grandan disputon: La kontraŭuloj de ĉi tiu propono asertis, ke la foriro el la geto kaj ĝia transdono al senarmaj virinoj kaj infanoj, kiuj ne kapablas batali, ne estas pli ol fuĝo pro timo. Krome oni opiniis, ke la ŝancoj sukcese batali en la arbaro ne estas pli bonaj, se oni konsideras la fremdan ĉirkaŭaĵon kaj la mankantan preparadon al la vivado en la arbaro. La subtenantoj de la partizana batalo respondis, ke la armata batalo ene de la fermita geto egalus al memmortigo, se oni konsideras la militteknikan ekipaĵon de la germana armeo kaj ĝian gigantan superecon. Se la geto estas kondamnita pere, tiam almenaŭ ĉiuj, kiuj povas batali, devus batali en loko, kie oni povas kaŭzi al la germanoj gravajn perdojn, t.e. en la arbaroj; laŭ tiu maniero oni almenaŭ venĝus la morton de siaj karuloj, kiuj ne povis savi la propran vivon.

La argumentoj pri la metodo de la batalo kontraŭ la okupantoj dividis eĉ la komunisman junularon. La energi plena kaj movlerta Judyta Nowogródzka, kiu ne plu subtenis la opozicion post kiam ŝi estis eliminata de la „gvidantoj“ de la organizaĵo, fondis novan organizaĵon, kies sola celo estis starigi partizanan strukturon. Jam en decembro 1942 la unua partizana grupo forlasis la geton – temis pri bone armitaj gejunuloj, nomataj „Krynky-anoj“³⁴ laŭ Krynky, la urbo, el kiu la plimulto de ili venis. Ilia komandisto estis la „kuraĝa Maksym“ (pseŭdonimo).

Ili detruis kelkajn antaŭpostenojn de la germana polico, mortigis kelkajn policistojn kaj akiris ne malmultajn armilojn. Kelkajn semajnojn poste, pro iu incidento en la proksimeco de Lipowy Most,

³² T.e. Bund.

³³ Ĥajka Grossman (1919-96) estis la aŭtorino de aŭtobiografio, en kiu ŝi traktis siajn spertojn en la juda subtera movado en Bjalistoko kaj kiu aperis en 1993 en Germanio (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Haika_Grossman).

³⁴ Pollingve Krynkowcy.

la germanoj estis devigitaj retiriĝi malgraŭ sia supereco laŭ nombro kaj armiloj. Ses germanoj pereis kaj kvar estis vunditaj. Maksym mortis kiel heroo. Lia morto kaŭzis krizon en la bataliono. Dum la vintro la plimulto de la membroj revenis al la geto kaj preparis sin por reiri al la arbaro en printempo. La aktivecoj de la „Krynky-anoj“ vekis grandan simpatian ĉe la geta junularo por la ideoj de la partizana batalo.

La eventoj iom poste montris, ke la adeptoj de la partizana movado pravis. Komence de februaro 1943 sekvis jena oficiala sovetia komunikado al la mondo: „Paulus³⁵ kapitulacis kune kun la restaĵoj de la 6a Armeo antaŭ la sovetia armeo.“ Stalingrado estis savita. Tio estis la turnopunkto en la milito. La 3an de februaro jena komunikado de la ĉefa stabo de la germana armeo anoncis al la mondo: „La batalo en Stalingrado finiĝis.“ Antaŭe la germanoj travivis decidan malvenkon ĉe El Alamein.

La Ruĝa Armeo komencis sian venkan triumfon kaj la Aliancanoj malfermis sian ofensivon en Afriko. Post tiuj venkoj en la Bjalistoka geto sentoj de ĝojo miksiĝis kun duboj kaj malespero.

Barasz

La 25an de januaro 1943 la germanoj likvidis la plej lastan geton en la regiono, nome tiun de Jasionówka. Komence de februaro malgajaj antaŭsentoj ŝvebis super la bjalistoka geto. De Barasz, la „reĝo“ de la geto,³⁶ la Juda Konsilio eksciis, ke la germanoj postulas „sangan tributon“. Tiu malbona novaĵo atingis la stratojn kaj kaŭzis teruran malesperon. La homoj iradis konfuzite tra la stratoj kaj sur iliaj vizaĝoj estis legebla la signo de la morto. La vivo sur la stratoj silentiĝis, la ridado kaj bruo malaperis. La aspekto de la malgrandaj infanoj estis korŝira. Ili estis apatiaj kaj sensentaj, kvazaŭ ili konis la sorton, kiu atendis ilin.

Kiu povas priskribi la angoron de la gepatroj, kiuj konsciis pri la sorto de siaj infanoj kaj ilia senhelpeco vide al la minacanta ekstermo? La vintro malhelpis ĉian fuĝon en la arbaron. La geto preparis sian pasivan defendon. Praktike en ĉiu domo estis preparita iu kaŝejo. Dum la nokto estis konstruitaj tranĉeoj kaj subteraj bunkroj kaj en la ĉambroj estis starigitaj aldonaj artefaritaj muroj, kiuj reduktis ilian grandecon por krei spacon, kiu povis esti uzata kiel kaŝejo. La enirejoj al la subtegmentejoj kaj keloj estis kamuflitaj.

Per ĉi tiu metodo la ŝafido volis defendi sin kontraŭ la avida besto. Inter la batalema junularo estis aŭdebla jena frazo: „Ni ne rezignos, ni ne iros kiel bruto al la buĉejo.“ Sed pafarmilojn oni ne havis, nur vitriolon, lesivon kaj ferajn stangojn.

La organizaĵo estis malforta kaj ĝiaj komandistoj estis tro hezitemaj kaj senspertaj. La etoso estis depremita, ĉar morti tiel juna kaj tiel mizere kiel hundo estis malfacile.

En la nokto de la 4a al la 5a de februaro la Juda Konsilio ordonis al siaj dungitoj kaŝi sin kun siaj familioj en la fabrikoj kaj donis al ili samtempe fikciajn laboratestilojn. La Juda Konsilio savis siajn homojn lastmomente. La portantoj de sekretoj jam sciis, ke la Gestapo en Bjalistoko ricevis mesaĝon el Treblinka kaj Majdanek, ke tie ekzistas „d disponeblaj lokoj“ en la gasĉambroj kaj kremaciejoj. De la prezidanto de la Juda Konsilio, inĝeniero Barasz, oni postulis, ke li transdonu al la germanoj ses mil „neproduktivajn laboristojn“.

Barasz cedis al la postuloj de la germanoj anstataŭ alvoki la amasojn „defendu vin, se vi povas!“ aŭ „savu vin, se vi povas!“ . Aŭ doni al si kuglon aŭ, kiel Czerniaków en Varsovio faris, veneni sin.³⁷

³⁵ Generalfeldmarŝalo Friedrich Paulus (1890-1957) estis la ĉefkomandisto de la 6a germana armeo dum la batalo en Stalingrado.

³⁶ Efraim Barasz, naskita en 1892 en Wolkowysk, estis prezidanto de la Juda Konsilio en la Bjalistoka geto. Li estis inĝeniero kaj esperis eviti la likvidon de la geto kaj la mortigon de ĝiaj loĝantoj per laborpostenoj. En oktobro 1943 li estis mortigita. (Vd. https://pl.wikipedia.org/wiki/Efraim_Barasz).

³⁷ Adam Czerniaków, la fama prezidanto de la Juda Konsilio en la Varsovia geto, decidis mortigi sin la 23an de julio 1942, post kiam la germanoj postulis de li prepari la deportadon de la judoj al Treblinka.

Li kredis, ke se li transdonos ses mil de siaj fratoj, li povus savi la restantajn kvindek mil. Lia plej granda krimo estis, ke li konsentis pri ĉi tiu teruraĵo, ke li kredis al la germanoj kaj trompis la amasojn, kiuj fidis lin.

De ĉi tiu tago la aŭreolo de tiu ĉi ĉiopotenca savanto de la geto, inĝeniero Barasz, paliĝis. De tiam li aperis kiel tragika partnero en la murdo de la juda popolo, kiu postvivis sian krimon je plia duonjaro, tirante kune kun si la reston de la geto en la abismon.

La masakro de la 5a de februaro 1943

Vendredon, la 5an de februaro 1943 je la kvara horo matene, la germanoj penetris en la geton. La unua „operaco“ komenciĝis. Barasz kuris kun la listo en la manoj ĉe la pinto de la Gestapo kaj vokis la nomojn de tiuj, kiuj estis antaŭviditaj por morti. (La cinika humuro de la geto vestigis ĝin poste per jenaj vortoj: „Barasz tranĉis la rubandon.“). La juda sekureca servo helpis al Barasz efektiviĝi ties „justan“ operacon, detruante la kaŝejojn kaj montrante la sekretajn lokojn, en kiuj la judoj kaŝiĝis. Ekzistis ankaŭ judoj sen honto kaj konscienco, kiuj prirabis la loĝejojn de tiuj mizeruloj, kiuj estis destinitaj por morti. Pluraj dekoj da denunciatoj vagadis tra la stratoj kaj domoj por elspuri la kaŝejojn de la judoj kaj malkovrigis ilin al la germanoj je la prezo savi la propran mizeran vivon por la momento. Barasz, la juda milico kaj la „mosrimoj“ (denunciatoj) fariĝis simboloj de la honto kaj malestimo de la suferoj de milionoj.

La memdefendo estis kompleta fiasko. Kelkaj komandistoj perdis sian vivon, aliaj dividis la sorton de siaj fratoj en la geto. La manko de defenda plano same kontribuis al tio kiel la diseriĝo de la grupoj kaj la manko de unueca organizaĵo. En la bunkroj la junularaj grupoj vane atendis signon de armata rezisto.

La novaĵo, ke la germanoj ne tuŝos la fabrikojn kaj la laboristojn, kiuj tie serĉis protekton kun siaj familioj, havis negativan efikon. Iuj organizaĵoj ordonis al siaj membroj kaŝi sin en la fabrikoj kaj defendi sin, nur se la germanoj atakos ilin. La rezistaj aktivecoj estis sporadaj kaj sen kunordigo. En la Kupiecka-strato 29 Iĉok Malmed verŝis vitriolon sur grupon de SS-anoj. Unu el ili blindiĝis, la dua estis korodita kaj en la konfuzo la blindulo mortpafis sian kamaradon. Malmed profitis la maltrankvilan situacion kaj eskapis. La germanoj bolis pro kolero, kaptis cent homojn el la najbaraj domoj kiel ostaĝojn – virojn, virinojn, infanojn – kaj mortigis ilin en la ĝardeno de Prager. Ili minacis mortigi pliajn kvin mil, kaze ke la kulpulo ne reaperos en la venontaj ses horoj. Malmed kapitulacis libervole, li estis kruele torturita kaj pendigita ĉe la pordo de la domo en la Kupiecka-strato. Antaŭ ol esti pendigita, li sukcesis fari ardan paroladon kontraŭ la germanoj, en kiu li promesis al ili decidan malvenkon kaj venĝon.³⁸

Malmultan tempon poste la familio Kuriański verŝis en la sama strato bolantan akvon sur la germanojn, kiuj post tio mortigis la tutan familion. En la Ciepla-strato Fryda Feld kaj Bluma Laks ĵetis mangrenadojn kontraŭ la germanojn. Nelonge post sia atako tiuj du heroinoj estis mortigitaj. En la Smolna-strato grupo de ĉirkaŭ dudek junaj viroj rezistis sub la komandisto Edek Boraks, la armea instruisto de „Haŝomer Hacair“, mallonge sed verve kontraŭ la germanoj, suferante gravajn perdojn. Tiuj, kiuj sukcesis eskapi el la trajnoj survoje al Treblinka, rakontis en la geto pri la ribelo de la pereontaj viktimoj en la vagonoj. La gvidinto de la ribelo estis Boraks, kiu pereis en tiu batalo kune kun siaj amikoj, do ne permesante al la germanoj sendi ilin en la „banejojn“.³⁹

En la Chmielna-strato 19 sin barikadis dek sep personoj en ĉambro de la mansardo, ok junaj viroj kaj naŭ junaj virinoj: Lolek Minc, Zola Dworecki, Srolik Szternfeld, Abrasza Gerszumi, Rachela

³⁸ Pri Iĉok Malmed vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Icchok_Malmed. En la angla teksto la nomo estas Melamed.

³⁹ Temas pri Eliyahu (Adek aŭ Edek) Boraks, naskita en 1918 en Kalisz. Li membris en la judaj subteraj movadoj de la getoj de Vilno (1940) kaj Bjalistoko. Post la eksplodo de la milito li deĵoris en la pola armeo. En decembro 1941 li iris al Varsovio, poste revenis al Vilno, kie li aktivis en la Unuiĝintaj Partizanaj Organizaĵoj (FPO). De tie li iris al Bjalistoko por esti aktiva en la Juda Batala Organizaĵo (ZOB) kaj komandis, en februaro 1943, unuon de batalantoj. Li estis kaptita de la germanoj kaj deportita al Treblinka. (Vd. http://www.infocenters.co.il/gfh/notebook_ext.asp?book=33785&lang=eng&site=gfh). Ne estas klare (al mi), pri kiu „ribelo antaŭ la pordo de la koncentrejo“ temas. La fama ribelo en Treblinka okazis la 2an de aŭgusto 1943, kadre de kiu eskapis el la koncentrejo iu Gustav Boraks (nask. en 1901 en Wieluń), kiu estis deportita kun sia familio el Ĉenstoŝovo al Treblinka en septembro 1942.

Rozenszejn kaj aliaj. Ĉiuj estis armitaj per vitriolo kaj hakiloj. Ili decidis ne rezigni tiel longe ke ili restos vivaj. Kun la helpo de la juda polico la germanoj trovis ilian kaŝejon. Tra la mansarda luko la defendantoj ĵetis botelojn kun vitriolo kaj atakis ilin per hakiloj. Du germanoj estis vunditaj, sed la ĉasantoj retiriĝis. Komenciĝis sieĝo. La germanoj pafis per mitraloj kontraŭ ilin, kaj kiam ili rimarkis, ke la junuloj ne havas pafilojn, ili sturmis la mansardon kaj devigis ilin eliri sur la straton. Tie ili devis viciĝi kontraŭ la muro kaj estis detale traserĉitaj.

Komenciĝis mallonga pridemandado: „Kiu faris tion?“ La unua en la vico, kiu estis sperta teksisto, nur kunpremias siajn lipojn. Aŭdiĝis pafo. La lamanta Szternfeld same reagis. La tria en la vico montris al la morta Szternfeld: „Estis li!“ La germanaj krimuloj estis kontentaj pri du viktimoj kaj kondukis la aliajn kun levitaj manoj al centra loko, kie la malliberuloj estis amasigitaj ĉe la angulo de la Kupiecka- kaj Jurowiecka-stratoj, antaŭ la granda kudrejo de la Juda Konsilio. De ĉi tie grupoj de plurcent homoj estis kondukitaj al la Fabryczna-strato, al la Wolności-placo kaj al la Sienkiewicz-strato, kaj la transporto de la perditaj homoj iris al la Poleski-stacidomo.⁴⁰ Ĉi tie ili estis pelitaj en trajnvagonojn kaj deportitaj al Treblinka. En la Poleski-stacidomo la varsovia metallaboristo Abraszka (lia familia nomo ne estas konata) profitis momenton, kiam la SS-anoj okupiĝis pri io alia, grimpis sur la tegmenton de iu vagono kaj faris mallongan, ardan paroladon. En la brakoj li tenis sian infaneton, kiu estis kelkajn monatojn aĝa. La terurigitaj homoj, kiuj preskaŭ ŝok-ŝtoniĝis en la vagonoj, kaj la poloj, kiuj ne estis malproksimaj, aŭdis liajn vortojn pri la ebriiga venko super la germanaj monstroj en Stalingrado kaj pri la baldaŭa malvenko de la germanaj fiuloj, kiuj povas venki nur sendefendajn homojn. Li finis sian paroladon per la vortoj: „Ni mortos, sed tre baldaŭ ili sekvos nin“ kaj montris al la alproksimiĝantaj murdistoj. Serio de pafoj trafis lin kaj li mortis kune kun sia bebo.

La februara masakro, kiu estis nomata „la unua operaco“, daŭris unu semajnon, de la 5a ĝis la 12a de februaro, kaj kaŭzis dek kvin mil viktimojn; du mil estis mortigitaj surloke. La epilogo de la sanga semajno okazis en la fama „15“ (la sidejo de la Gestapo en la Sienkiewicz-strato), kie dek kvar junuloj kun arjaj dokumentoj estis arestitaj, kiuj malgraŭ grava turmentado ne malkaŝis la organizaĵon nek la nomojn de la poloj, kiuj falsis iliajn dokumentojn. La Gestapanoj mem raportis al siaj amikoj ĉe la Ordoservo pri la kuraĝa knabino Henia Lewin el Varsovio, kiu kraĉis kontraŭ la vizaĝoj de siaj turmentantoj por sentime esprimi siajn malestimon kaj malamon al ili. Ĉiuj dek kvar estis mortigitaj.

La varbado de novaj membroj sukcesis. Speciala emfazo estis metita sur homojn de siaj propraj fabrikoj, en kiuj reto de ĉeloj de la rezista movado tre rapide disvolviĝis. La partia movado ankaŭ kreskis. La sperto de la unua ago klare montris la senesperecon de milito en la fermita geto. Multaj junuloj, kiuj ne povis esti akceptitaj en la organizon, kiu laboris sub la malfacilaj kondiĉoj de la subtera kaj ne grandskale, fondis grupojn memstare por aktivi en la arbaro; ili forlasis la geton por batali kontraŭ la kruelaj okupantoj.

Dum tiu operaco la rezistaj grupoj devis elteni gravajn perdojn, precipe tiuj, kies membroj ne retiriĝis de siaj pozicioj sur la batalkampoj kaj ne serĉis sekuran rifuĝejon en la fabrikoj (la komunistoj kaj la Haŝomer-anoj). La perdo de la plej bonaj batalantoj kaŭzis deprimon en la vicoj de la organizaĵo. Ĉi tiu situacio daŭris nur mallongan tempon, antaŭ ol ĝi estis restarigita per nova verovo. La „februara masakro“ ne permesis estigi iluziojn pri la definitivaj planoj de la germanoj koncerne la geton. La rekrutigo de novaj membroj pasis sukcese. Aparte preferataj estis homoj el la propraj fabrikoj, en kiuj tre rapide estiĝis reto de ĉeloj de la rezista movado. Ankaŭ la partizana movado kreskis. La spertoj de la unua operaco klare montris la senperspektivecon de la milito en la fermita geto. Multaj junaj homoj, kiuj ne povis esti akceptitaj de la organizaĵo kaj ne povis labori grandskale sub la malfacilaj kondiĉoj de la subtera agado, memstare fondis grupojn por aktivi en la arbaro. Ili forlasis la geton por batali kontraŭ la kruelaj okupantoj.

Aliaj kun pli grandaj kapabloj armadis sin per pafiloj laŭ diversaj manieroj kaj turnis sin orienten por aliĝi al la partizanaj grupoj. La grupo de Judyta, kiu okupiĝis nur pri la organizado de partizanaj taĉmentoj, allogis multajn junajn homojn. En aprilo 1943 estis elsendita malgranda grupo kun Berl Watersztajn ĉe la pinto por konatiĝi kun la tereno. Ĝi estis malbone armita kaj disiĝis post interbatalo

⁴⁰ Temas pri la nuntempa stacidomo Białystok Fabryczny.

kun la germanoj en la proksimeco de Lipowy Most. Post kiam la grupo perdis la kontakton kun sia trupo, ĝiaj anoj retiriĝis al la geto.

Dua grupo de dek ses personoj estis komandita de Talk. Ŝi forlasis la geton en la nokto de la 24a de majo. Tre proksime de la getaj muroj en la Jurowiecka-strato okazis akra interpafado kun la germanoj. Germana policisto estis mortigita, kaj la batalantoj retiriĝis al la geto sen perdo. Alia provo sukcesis dek tagojn poste, la 3an de junio 1943.

Forlasante la geton armite survoje al danĝera misio, du famaj kontrabandistoj faris tre valoran servon: Nohum Abelewicz kaj Joel Kissler. Ambaŭ estis lojalaj batalantoj, kiuj oferis sin en la konflikto kun la germanoj. Abelewicz falis la 16an de aŭgusto 1943 dum provo trarompi la barilojn, kiuj ĉirkaŭis la geton. Kissler pereis kelkajn tagojn poste en la Izoby-arbaroj, kiam li malatenteme manipulis bombon de aviadilo, kiu eksplodis kaj mortigis lin kaj lian amikon, la partizanon Grysza Łuński.

La premo de la eventoj ankaŭ devigis la grupojn en la bloko A revizii sian strategion rilate al la partizanoj. Kvankam ili ne rezignis pri la ideo de armita batalo ene de la muroj de la geto, ankaŭ ili komencis formi partizanajn grupojn. La unuaj de tiaj grupoj forlasis la geton komence de printempo 1943; ili estis gvidataj de Borowik kaj Rywa Szynder. Poste la komandon de tiu grupo transprenis Jerzy Suchaczewski („Saša“) el Varsovio, kiu estis brava kaj nobla homo, profesia presisto kaj iama sportinstruisto de la organizaĵo „Morgensztern“ (matena stelo). Saša mortis kiel heroo en batalo kun la germanoj en la Izoby-arbaroj je la 25a de septembro. Laŭ simila maniero pereis Borowik la 2an de januaro 1944 en la proksimeco de Dworzysk. La nombro de judaj partizanoj, kiuj organiziĝis en Bjalistoko kaj iris en la arbarojn, estis ĉirkaŭ cent kvindek personoj. La manko de armiloj kaŭzis grandajn problemojn kaj malhelpis al volontuloj kaj rekrutoj partopreni en tiu ĉi misio. Multaj el tiuj atendantoj pereis aŭ en la geto dum la operaco en aŭgusto, aŭ en Treblinka aŭ Majdanek.

La manko de armiloj kondukis al longa serio de kuraĝaj operacoj kiel la ŝtelo en la armila deponejo de la germanoj en la Sienkiewicz-strato. Dum tiuj misioj elstaris la sekvaj personoj: Ruwin Lewin el Wyszaków, Natek Goldsztajn (ambaŭ pereis en la arbaroj), Wełwł Wołkowyski (kiu falis dum la operaco), Maryla Różycka, la heroino el Lodzo, kaj la kuraĝa partizano Marek Buch el Varsovio.

Du nekonataj judoj el Grodno estis kaptitaj dum la kontrabandado de armiloj en la geton. La germanoj arestis ilin, sed ili defendis sin kaj mortigis unu policiston en la Wysoki Stoczek-strato. Unu el ĉi tiuj batalantoj mortigis sin mem kaj la dua estis mortpafita surloke.

La batalaj organizaĵoj bone atentis la germanajn spionojn, kiuj svarmis en la geto. Komence de la somero iuj informantoj de la Gestapo estis mortigitaj de kugloj fare de la rezista movado – la fratoj Judkowski kaj Ćwiklicz, kies nomoj estas menciitaj nur en terura honto.

Ĝenerala striko

La okazaĵoj de la 1a de majo 1943 estis pruvo de la kreskanta batalemo kaj de la partopreno en la rezista movado. Ĉiuj laboristoj de la geto festis sen escepto la tagon de la solidareco kun la laboristoj de la mondo. Kompreneble ne eblis iri sur la straton kaj partopreni en amasaj manifestacioj aŭ resti hejme kaj foresti de la laboro en la fabrikoj. La Gestapo estus tuj brutale fininta tian agadon. Pro tio ĉiuj laboristoj aperis ĉe siaj laborlokoj en la proksimeco de siaj maŝinoj, sed la maŝinoj ne funkciis. La ĉeloj de la organizaĵo, kiuj superŝutis la fabrikojn, zorgis pri tio, ke neniu aŭdacas labori. La laboristoj spontane aliĝis al la striko kaj neniu rompis ĝin. Eĉ la estroj, kiuj respondecis por la produktado, ne kuraĝis kontraŭstari la strikon. Kiam ili vidis germanon veni, ili tuj enŝaltis la maŝinojn, kaj en la momento, kiam la germano foriris, ili denove elŝaltis ilin. Laŭ tiu maniero la tuta laboro haltis; same ĉesis funkcii la kudromaŝinoj en la granda tajlorejo de la Juda Konsilio (la kudristejo de Waksman⁴¹) kaj en la tajlorejo de Steffen kiel ankaŭ en la kartona fabriko, en la mekanikaj metiejoj, la kemiaj fabrikoj kaj en la granda ŝufabriko. Per tio la tuta geto, kiu estis granda laborlagro, demonstris sian apartenon al la progresema mondo sub la militaj sloganoj de la venko super la faŝismo. Ĥoroj kantis revoluciajn kantojn kaj kantojn de la Ruĝa Armeo, kiuj atingis la geton pere de sovetiaj militkaptitoj, precipe en la

⁴¹ Waksman estis la nomo de la juda direktoro de la fabriko en la geto, kie la judoj kudris uniformojn por la germana armeo.

ĉirkaŭaĵo de la 10a Ulana regimento. „La kanto pri la komisaro“ estis aparte ŝatata kaj estis kantata hejme kaj en la fabrikoj, precipe la strofo „Ni ofte batos la germanan serpenton“.

La ĝenerala striko de la Bjalistoka geto atestis la kredon de kvindek mil homoj je la malvenko de la germanaj ekzekutistoj, en kies manoj ili troviĝis, kaj ĝi ankaŭ esprimis la admiron por tiuj, kiuj batalis kontraŭ la malamiko. Por la germanoj ĝi signifis danĝeran averton.

Estis la ironio de sanga sorto, ke la germanoj mem festis la unuan de majo kiel propran nacian festotagon en la proksimeco de la perdita geto! De la sangoplenaj flagoj la kurbaj najloj de la svastiko etendiĝis ĝis la geto.

La ĉefaj ŝanĝoj okazis ĉe la interna fronto de la rezista movado. Dekomence la diseriĝo kaj la manko de unueca gvidado malfortigis la movadon. Tio estis la ĉefa kaŭzo de la fiasko de la organizaĵo dum la unua operaco. Tion ĉi jam de longe komprenis multaj junuloj, kiuj estis organizitaj en diversaj grupoj. Kun zorgo la junularo vidis la mankon de interkompreniĝo kaj unueco inter la gvidantaroj de la organizaĵoj. La rezultanta damaĝo estis tiel evidenta kaj la premo de sube tiel forta, ke en somero unuafoje eblis atingi la kuniĝon de la grupo de Judyta kaj la bloko A. Kaj post kelka tempo estis starigita ankaŭ ligo inter la blokoj A kaj B por formi kontraŭfaŝisman batalblokon.

Mordeĥaj Tenenbaum fariĝis la estro de tiu batalbloko. Li estis konata, respektata kaj altestimata aktivulo, organizanto kaj batalanto de „Heĥaluz“.⁴² Je lia flanko staris Daniel Moszkowicz (komunisto). La ekzekutivo ampleksis reprezentantojn de ĉiuj batalantaj grupoj.

Definitiva likvido de la geto kaj pereado de la bravaj rezistanoj

Bedaŭrinde, ĉio ĉi okazis tro malfrue. Antaŭ ol la nova unuiĝinta fronto sukcesis organizi sin, la fina likvido de geto trafis ĝin la 16an de aŭgusto 1943 kiel fulmo el la hela ĉielo. Dum multaj getanoj kaj precipe la Juda Konsilio kun Barasz ĉe la pinto anticipe atendis la unuan operacon en februaro, la dua operaco komplete surprizis la geton, same Barasz-on kaj eĉ la Gestapon en Bjalistoko. Taĉmentoj de la germana, ukraina, blankrusa kaj latva SS, kiuj estis sekrete translokigitaj, efektivigis la plej lastan operacon.

La aŭgusta operaco surprizis ankaŭ tre multajn homojn kun „tre konvinkaj“ arĵaj dokumentoj, same tiujn kun arĵa aspekto kaj eĉ tiujn, kiuj vivis ekster la geto kaj en tiu momento vizitis konatojn en ĝi. Ili estis konvinkitaj, ke la geto ricevos anticipan averton en kazo de operaco. Ĉi tiun pritakson disvastigis Barasz kaj liaj fidelaj adeptoj, kiuj blinde kredis lin. Kaj nun oni komprenis, ke tio estis grava eraro kun tragikaj sekvoj.

Neniam ekzistis pli malzorga etoso ol kelkajn tagojn antaŭ tiu operaco. Estis la tempo post Stalingrado kaj El Alamein kaj post la venko de la Aliancanoj en Norda Afriko kaj ilia surteriĝo en Sicilio. La falo de Mussolini anoncis la malvenkon de Italio; la Orienta Fronto ŝanceliĝis kaj la 5an de aŭgusto 1943 aŭdiĝis por la unua fojo la tondro de la artilerio el moskva direkto. Tio signalis la liberigon de Orjol kaj Belgorod. En la koroj de la getaj loĝantoj rezonis la eĥo de ĝojplena espero. Helpo alproksimiĝis, sed la germanoj obstine celis gajni la militon kontraŭ la judoj.

La nokto de la 15a al la 16a de aŭgusto estis trankvila nokto kun plenluno. La unuiĝinta batalantaro de la rezista movado interkonsiliĝis sub la gvido de Tenenbaum ĝis noktomezo.

Ili preparis siajn armilojn kaj prenis antaŭdestinitajn poziciojn. Je la 6a horo estis anoncita la "evakuado de la geto" al Lublin. Ĉiuj loĝantoj devis iri al la strato Jurowiecka, de kie ili estos forigitaj. La germanoj La rezista plano estis detruigi la getajn barilojn, por ke la homamaso povu disiĝi en la urbo, dum la batalantoj eniru en la arbaron kaj aliĝu tie al siaj kolegaj gerilanoj. Al la batalantoj, kiuj ne plu kaŝis sian ĉeeston en la homamaso, aliĝis dekoj da homoj, armitaj per bastonoj, stangoj kaj ŝtonoj.

⁴² Mordeĥaj Tenenbaum, naskita en 1916 en Varsovio, gvidis la rezistan batalon de la Bjalistoka geto. Antaŭ ol alveni en la geto en novembro 1942, li jam apartenis al la subteraj organizaĵoj en Vilno kaj Varsovio. Laŭ la modelo de la Ringelblum-arkivo li kolektis dokumentojn pri la detruado de la Bjalistoka geto por starigi subteran arkivon. Post kiam ĉe la batalantoj en la geto elĉerpiĝis la municio, li mortigis sin en aŭgusto 1943. (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Mordechai_Tenenbaum).

Matene je la dua horo okazis alarmo: La SS-anoj ĉirkaŭis la geton kaj penetris en la fabrikan areon. La okupado de la fabrikoj malhelpis al la batalantoj efektiviĝi sian planon ekbruligi la fabrikojn komence de la atako. Estis klare, ke la horo de la definitiva neniigo de la geto alvenis. Ene de duona horo la batalgrupoj estis aktivigitaj. Ili preparis siajn armilojn kaj okupis antaŭe fiksitajn poziciojn. Je la sesa horo estis anoncita la „evakuado de la geto“ al Lublino. Ĉiuj loĝantoj devis iri al la Jurowiecka-strato, de kie ili devus esti deportitaj. La germanoj akiris sperton en la Varsovia geto kaj volis forigi la loĝantojn de la grandaj domblokoj, kie estis pli facile rezisti (stratoj Polna, Częstochowska, Nowy Świat kaj Kupiecka), al stratoj, kie ekzistis malgrandaj domoj kaj grandaj placoj, kiuj donis al la germanoj pli da spaco por manovri. La provoj de la batalantoj haltigi la homfluon en la Jurowiecka-strato fiaskis. Apatie kaj malkuraĝigite la amasoj plenigis la stratojn. Ĉiuj batalgrupoj de sektoroj, kiujn la loĝantoj forlasis, koncentriĝis en la ĉirkaŭaĵo de la Jurowiecka-strato, precipe en la stratoj Ciepła, Chmielna, Smolna, Nowogródzka kaj Górna. La rezista plano antaŭvidis la detruon de la getaj ĉirkaŭbariloj, por ke la homamaso povu disiĝi en la urbo, dum la batalantoj povu forkuri al la arbaroj por aliĝi al la partizanaj kamaradoj. Al la batalantoj, kiuj ne plu kaŝis sian ĉeeston en la homamaso, aliĝis dekoj da homoj, armitaj per bastonoj, stangoj kaj ŝtonoj.

La rezistaj batalantoj atakis unue. Estis la 10a horo matene. La flamoj estis la signoj de la milito en la stratoj Ciepła, Smolna kaj Nowogródzka. Ĉi tiuj homoj estis la heroinoj: Milka Datner,⁴³ Basia Kaczalska, Chaja Biała, Fania kaj aliaj, kiuj ekbruligis domojn, fabrikojn kaj pajlofaskojn. En la Fabryczna-strato brulis kaj la vata fabriko kaj la mekanikaj metiejoj. Forta fajro eliris el mitraloj kaj manpafiloj. Laŭ tiu maniero la batalantoj elŝaltis ĉiujn germanajn gardistojn, kiuj ĉirkaŭis la geton kaj gardis la barilojn. La germanoj rezistis nur malforte kaj retiriĝis. La rigardo al la mortaj germanoj kaj al la armiloj forprenitaj de ili, kuraĝigis la batalantojn, kiuj ĵetis sin, armitaj per grenadoj kaj boteloj kun benzino, kontraŭ la barilojn.

Samtempe, la pli kuraĝaj ne atendis breĉojn en la bariloj, sed tuj sturmatakis ilin. La peza paffajro de iliaj kamaradoj, kiuj pafis trans la brulantaj bariloj, donis al ili protekton. Sed la germanoj rapide reakiris la kontrolon pri la situacio. La giganta fajro de malpezaj kaj pezaj mitraloj kaj pistoloj miksiĝis kun la ĝemoj de la vunditoj kaj la krioj de la batalantoj. La germanoj starigis mitralojn en la fenestroj de la domoj kaj fabrikoj ĉirkaŭ la geto. De tie ili havis bonegan superrigardon kaj sukcesis kaŭzi gravajn perdojn al la batalantoj. Ilia atako kontraŭ la bariloj estis sangoplene kontraŭbatalata.

Eskadro de germanaj aviadiloj aperis en la ĉielo, flugis en malgranda alteco super la kapoj de la batalantoj kaj pripafis ilin de supre. La kuraĝaj batalantoj estis dividitaj laŭ pluraj unuoj kaj daŭrigis pafadi kontraŭ la germanoj. La fortoj estis tre malegale distribuitaj. Ĉirkaŭ tricent malbone armataj judoj batalis kontraŭ pli ol tri mil SS-soldatoj, kiuj estis ekipitaj per ĉiuspecaj modernaj armiloj. Ankaŭ ukrainaj kaj blankrusaj krimuloj subtenis la germanojn. La stratoj Nowogródzka kaj Smolna estis kovritaj de kadavroj. Al la batalantoj mankis municio. La bataltrupo en la legomaj ĝardenoj de la Juda Konsilio en la Nowogródzka-strato eltenis plej longe. Ĉi tie ĝi estis atakita de SS-anoj el la stratoj Ciepła kaj Poleska. Sed la atako estis kontraŭbatalata. La germanoj devis registri mortintojn kaj vunditojn. Ili nervoziĝis pro la longdaŭra batalo kaj alportis tankojn. Iu mino, kiu estis kaŝita en truo de la kanalizacio ĉe la angulo de la Kupiecka- kaj Ciepła-stratoj, eksplodis kaj devigis la tankojn retiriĝi. La germanoj sendis freŝajn infanteriajn taĉmentojn al la batalo. Kiam ilia municio elĉerpiĝis, la sepdek du preskaŭ enŝlositaj batalantoj retiriĝis al kaŝejo, kiu estis preparita en puto en la Chmielna-strato 7. La germanoj malkaŝis ilin kaj pafegis kontraŭ ilin per mitraloj ĉe la angulo de la Kupiecka- kaj Jurowiecka-stratoj. Falante kiel herooj en la batalo, ili vokis: „Faligu la germanojn! Faligu Hitleron! Morton al la faŝistoj! Vivu la Ruĝa Armeo! Vivu la demokratia Pollando! Vivu Stalin! La juda popolo ne pereos! Nia sango estos venĝita!“ Neniu petis kompaton. La ankoraŭ varmaj kadavroj estis ĵetitaj sur kamionojn kaj enterigitaj en amastombejo de la tombejo de la geto en la Żabia-strato. Tie ĉi la kuraĝaj filoj kaj filinoj de la juda popolo trovis sian eternan pacon, eternigante per sia morto la bravecon de la nacio.

⁴³ Milka (Miriam) Datner, la filino de Szymon Datner, kaŝiĝis kun Ewa Kracowska. Kiam ŝia patrino Róza (Ŝoŝana), naskita kiel Ŝamueli el Krakovo, volis kaŝi ŝin en alia loko, ambaŭ estis mortigitaj kune kun la dua filino Lileńka (Ŝulamit). En 1943 Miriam estis 18- kaj Ŝulamit 14-jara.

Tri horojn poste la batalo iom kvietiĝis, sed posttagmeze, je la kvina horo, la bataloj reeksplodis. La batalantoj provis denove trarompi la barilojn, sed vane. La germanoj disŝiris ilin por fari pli da spaco por pli bone manovradi, kaj ili alportis rezervojn.

Tri formaĵoj de germanaj soldatoj enfermis la geton. La unua atakis ĝin per daŭra malpeza pafado. La dua konsistis el taĉmentoj armitaj per mitraloj, kaj la tria enhavis artilerion kaj kavaleriajn regimentojn. Dum la nokto du vunditaj batalantoj iris al la juda malsanulejo en la Fabryczna-strato kaj diris al la kuracisto d-ro Cytron, kiu donis medicinan provizon, ke la municio baldaŭ elĉerpiĝos kaj ke ili konscias pri tio, ke ili mortos. Sed la etoso inter la batalantoj estis bona, ĉar la morto ne estas terura, se oni mortas kun armilo en la mano. Nokte la batalanto Ĥaim Rozanski atingis la malsanulejon kaj raportis, ke unu el la batalantaj trupoj komencis fosi subteran pasejon, kiu devis konduki el la geto eksteren.

Sporadaj bataloj eksplodis en la geto ankoraŭ en la sekvaj tagoj, aparte dum la noktoj. La batalantoj en la bunkroj en la Ciepła- kaj Nowogródzka-stratoj rezistis ĝis la 26a de aŭgusto. Kelkaj provoj estis entreprenitaj por eskapi el la geto, sed ili ne estis sukcesaj. La plej lastaj pozicioj de la batalantoj falis, kiam ili ne plu disponis armilojn. La 30an de aŭgusto iu grupo de batalantoj sukcesis eskapi el la geto tra la subtera tunelo kaj aliĝi al la partizanoj en la arbaroj.

Dum la batalo kun la germanoj en la proksimeco de Cieliczanka falis la kuraĝa komandantino Sonia Szmil el Slonim.

El la multaj eventoj okazintaj en tiu batalo, devas esti menciita la malsukcesinta provo mortigi la ekzekutiston de la geto kun la nomo Dybos, „Konsilisto pri judaj aferoj ĉe la Gestapo“. Li troviĝis en la ĉefsidejo en la konstruaĵo de la Juda Konsilio en la Kupiecka-strato, de kie li gvidis la likvidan operacon. La batalanto Ruwczak pafis lin per du revolveroj, sed li estis mortigita per reveninta pafado, dum la germana turmentanto restis nelezita.

En la Woltan-fabriko la batalantoj mortigis inter la maŝinoj altrangan germanan oficiron kaj lezis kelkajn liajn kamaradojn.

El tiuj batalantoj postvivis nur la kuraĝa Ĥajka Grossman, kaj el la dudek sep heroaj batalantoj restis viva sub nekonataj cirkonstancoj nur Berel Szacman. La komandanto de la batalantoj, Mordeĥaj Tenenbaum, kaj lia kamarado Daniel Moszkowicz mortigis sin. La blokado de la geto daŭris tutan monaton. La 15an de septembro 1943 la SS-trupoj foriris, post kiam la plej lasta flamo de la rezisto estingiĝis.

Laŭ tiu maniero finiĝis la rezista movado de la Bjalistoka geto, kaj la batalantoj de Bjalistoko aldonis plurajn paĝojn de grandioza heroeco al la ĉapitroj de la epopeo pri la granda braveco de siaj fratoj en la Varsovia geto.

Dekmiloj da judoj en la geto pasive observis la militon de siaj plej bonaj filoj kaj filinoj kaj ne partoprenis en la batalo. Posttagmeze sekvis la ordono komenci la foriron. La judoj de Bjalistoko mute komencis sian plej lastan vojaĝon, eskortite de du vicoj da krimuloj. Elsekiĝintaj pro sojfo kaj turmentitaj de SS-anoj, ili atendis en la Poleski-stacidomo senhelpe sian deportadon.

La germanoj primokis ilin por la plej lasta fojo laŭ kruda germaneca maniero. Ĉirkaŭ mil infanoj estis disigitaj de siaj senesperaj gepatroj, kiujn la sbiroj repelis en la geton por „sendi ilin al Svislando“. La vojo al Svislando iris tra la geto Theresienstadt en Ĉeĥoslovakio kaj de tie al Aŭŝvico, kie ilia migrado finiĝis.

Teroro en la malsanulejo

Plej ŝoka estis la evakuado de la juda malsanulejo en la Fabryczna-strato en la malnova konstruaĵo de TOZ.⁴⁴ La judaj kuracistoj, kiuj postvivis la inferon en la germanaj mortlagroj, poste raportis pri la faŝismaj metodoj de la germana besto. En la unuaj kvar tagoj de la operaco la germanoj ne tuŝis la malsanulejon. La 20an de aŭgusto, la ekzekutistoj de la judoj de Bjalistoko, la kriminala inspektisto kaj

⁴⁴ Pollingve Towarzystwo Ochrony Zdrowia signifas Asocion por Sanprotektado.

SS-ano *Friedel*,⁴⁵ germanoj kaj ukrainoj penetris en la judan malsanulejon. Ili forpelis la pacientojn el la litoj kaj kriis: „Eliru, ek, rapide!“ Ĉi tiuj vortoj, kiujn ili aŭdis en la plej lastaj momentoj de sia vivo, estis bone konataj al milionoj da senkulpaĵaj viktimoj.

Friedel akcelis la evakuadon kun bona humoro kaj diris de tempo al tempo: „Pli rapide, pli rapide – la speciala trajno jam atendas vin“. La speciala trajno konsistis el ĉevalĉaroj, kiuj staris en vico ekster la malsanulejo.

Pro siaj operaciaj vundoj la pacientoj de la kirurgia sekcio nur malrapide vestiĝis kaj estis batitaj per pugnoj kaj bastonoj sur la kapon kaj dorson. Apartan atenton de unu el la krimuloj ricevis la patro de la flegistino Fryda Ostrów, kvankam li estis malforta maljunulo kun blanka barbo. Plurfoje trafita de pafilkolbo, li reagis laŭ neatendita maniero: Li levis la bastonon, sur kiu li apogis sin, kaj batis la buŝon de la soldato, kiu eksilentis pro mirado kaj ŝokiĝo. Kiam li retrovis sian konscion, la krimulo saltis sur la liton de alia paciento, tretis lian vizaĝon per ŝuo kaj mortpafis lin per salvo de kugloj. La cerbo de la kompatinda sinjoro estis ŝprucita kontraŭ la muro.

Ŝokita de ĉi tiu okazaĵo en la hospitalo, flegistino Długacz glutis ciankalion. Aŭdinte la pafojn, la krimuloj kuris sovaĝe en la ĉambron, ĵetis la pacientojn el siaj litoj kaj devigis ilin laŭte kriante kaj sakrante iri en la vagonojn, kvankam ili surhavis nur subpantalonojn. Per kruda perforto ili prempuŝis ilin en la „specialan trajnon“.

La germanoj kuris kun la beboj el la naskiĝsekcio kaj ĵetis ilin kiel faskojn de ŝultro al ŝultro. Ilin sekvis la elĉerpitaj patrinoj, kiuj marŝante apogis unu la alian. Ili iris kiel mortintoj. Neniu protesto, neniu petado, neniu sakraĵo. La germanoj traktis la bebojn, kvazaŭ ili estus senvivaj objektoj. Laŭta, kruda rido aŭdiĝis ĉirkaŭ ili; la malgrandaj vizaĝoj de tiuj homaj kokidetoj aspektis tiel amuze. La beboj ne kriis. Ili jam estis duone mortaj. De la ĉaro oni aŭdis nur subpremitan plorĝemadon.vagon

La patrinoj apenaŭ povis trovi lokon sur la dua vagono. Ĉio estis preta. Friedel donis la signalon por forveturi.

La „speciala trajno“ ekmoviĝis.

Lia parado antaŭ la kuracistoj kaj flegistinoj, kiuj aspektis ŝtonigite de la terura vidaĵo, estis alia „atingo“ de li. Ili iradis de la Kupiecka-strato al la Żabia-strato. Ĉi tie ĉiuj estis mortpafitaj kaj ĵetitaj en foson – viroj, virinoj kaj infanoj. Tiel finiĝis la evakuado de la malsanulejo en la Fabryczna-strato en Bjalistoko, la 20an de aŭgusto 1943.

Res sacra miser...⁴⁶

La transportoj de la judoj de Bjalistoko iris al okcidento kaj iliaj celoj estis: Treblinka, Majdanek, Bliżyn⁴⁷ kaj Aŭŝvico. Eble iuj aliaj ankoraŭ iom esperis, ke ili povus eskapi la morton, sed tia eblo ne ekzistis por judoj.

En la arbaroj de Supraśl kaj Knyszyn la partizanoj de Bjalistoko daŭrigis sian armatan lukton kontraŭ la murdistoj de la juda popolo. Ĉi-foje ili unuiĝis en unu asocio (grupoj de Judyta, Sasza Suchaczewski kaj Eliaasz Baumatic). De majo 1944 ili fariĝis parto de sovetia partizana unuo sub generalo Kapusta. Ili servis en la brigado „Kosta Kalinowski“, en la regimento de Wojciechowski kaj en la taĉmentoj de la „matrosoj“ kaj de la „26a de oktobro“. Kelkaj inter ili pereis en la batalo, aliaj postvivis kiel atestantoj de la turmentado de milionoj, de la sinofera braveco de la herojoj kaj de la degenerado de la germanoj.

La germanoj mortigis pli ol ducent mil (200'000) judojn de la bjalistoka regiono, inkluzive pli ol kvindek mil (50'000) el Bjalistoko mem. La kremaciejoj de Treblinka, Majdanek, Aŭŝvico kaj aliaj neniigejoj forglutis ses milionojn da judoj de Eŭropo, inter ili tri milionojn el Pollando. La pasiva sufero de milionoj de viktimoj kaj la morto de centmiloj de infanoj kaŭzas afekcion. En tiu ĉi tragedio la sola radio de espero estis la sindona batalo de dekmiloj da judaj soldatoj en la Kościuszko-divizio, en la Ruĝa

⁴⁵ Temas pri SS-ĉefŝturmestro Fritz Gustav Friedel (nask. en 1891), kiu estis la ĉefo de la Gestapo en Bjalistoko inter 1942 kaj 1944 kaj aranĝis la deportadon de la bjalistokaj judoj. En 1949 li devis aperi antaŭ pola tribunalo pro murdo al 130'000 judoj en 1943. Post kondamno al morto li estis ekzekutita en oktobro 1952.

⁴⁶ Latinlingve por la malfeliĉulo estas sankta afero.

⁴⁷ Vd. <https://pl.wikipedia.org/wiki/Bliżyn>.

Armeo, en la trupoj de la Aliancanoj kaj en la Juda Brigado, flanke de milionoj da batalantoj por pli bona estonteco de la homaro, same kiel la batalantoj en la getoj kaj la judaj partizanoj. Ĉiuj tiuj venĝis per sia batalo kaj sia braveco parte la morton de milionoj de senkulpaj viktimoj.

Epilogo

La 3an de novembro 1943 okazis en Majdanek la fifama masakro kontraŭ dudek mil judoj,⁴⁸ kies plimulto estis la plej lastaj judoj el Bjalistoko. En aparta grupo iris malgrandaj infanoj, po kvin en ĉiu vico, nudpiede, tenante la manojn, leĝere vestitaj, tremantaj pro malvarmo kaj timo.

El la laŭtparoliloj sonis la muziko de Strauss-valsos, foje miksitaj kun knalaj kaj pafaj, kaj la SS-uloj puŝis la infanojn antaŭen kun krioj kiel: „Pli rapide, pli rapide, vi baldaŭ varmiĝos!“

Tremante pro malvarmo kaj timo, la infanoj estis pelitaj en la kremaciejojn de Aŭŝvico.

Multaj „infanaj operacoj“ estas konataj de la getoj en meza kaj orienta Eŭropo. Plenkreskuloj, kiuj estis necesaj por labori, komence restis vivaj, dum la malgrandaj infanoj estis mortigitaj. La metodoj mortigi infanojn estas konataj. Kompare kun ili la mortigo per kuglo estintus bona faro. La germanoj starigis ekstermajn koncentrejojn kaj mortigis milionojn da infanoj (sole la nombro de judaj infanoj atingas unu milionon). La germanoj defiis la homojn kaj ... perdis. Kaj se ili estus gajnintaj? Kiam malgranda infano mortas, la anĝeloj en la ĉielo ploras. Kiam viro mortigas infanon, dekmilojn, centmilojn, milionojn da infanoj, tiam la diablo eble mem estas ŝokita kaj lia rido estingiĝas en la profundo de la infero. Post tio, kion la germanoj faris en la jaroj 1939 ĝis 1945 kaj kion ili ankoraŭ estus planintaj en la kazo, ke ili estus gajnintaj la milito, ili ekskludis sin mem el la familio de la nacioj kaj apartenas nun al la homaro nur en antropologia senco.

Nomi germanon persono estas vangofrapo por la tuta homaro. Voki germanon eŭropano estas insulto al la malnova kontinento, kiu simbolis ĝuste la malon. Popolo, kiu venigis Hitleron kaj la naci-socialisman partion al la potenco, popolo, kiu defendis la hitleran reĝimon fidele kaj sen cedi ĝis la fino, tiu popolo identiĝis kun lia reĝimo. Dum ses jaroj ĝi dikiĝis sur la sango, sufero kaj ŝvito de la konkeritaj popoloj. La materiaj varoj en la manoj de la germanoj estis grandparte ŝtelitaj aŭ rabitaj.

Dum ses jaroj la germana popolo faris krimojn pli terurajn ol la plej malhelaj penseblaj halucinoj kaj dormetas nur en la subkonscio de la homa besto.

La germana popolo estus farinta miloble pli terurajn krimojn, se ĝi estus venkinta en la milito.

La sango de milionoj da senkulpaj virinoj kaj infanoj postulas la punadon de tiuj krimoj.

Se la etiko kaj justeco estas la reguloj de la rilatoj inter la homoj kaj nacioj, tiam tiu voĉo estos aŭdita. Ho ve, se tiuj valoroj ne fariĝos la bazo de la rilatoj inter la landoj!

En la eterna lukto inter la bono kaj malbono, la lumo kaj mallumo, venkis la bono kaj la lumo, ĉi-foje je la prezo de senprecedencaj viktimoj.

Ormazdo venkis Arimanon.⁴⁹

Mi firme kredas, ke la homa spirito estas senmorta.

Mi estas firme konvinkita, ke la germano ne estas homo.

Memento Germaniae!⁵⁰

Bjalistoko, la 3an de decembro 1945.

⁴⁸ Temas pri la operaco „Erntefest“ (rikolta festo), kiu estis la kaŝnomo por la likvido de la judoj en la koncentrejoj de la lublina regiono. En la lagroj de Majdanek, Trawniki kaj Poniatowa estis mortigitaj, la 3/4ajn de novembro 1943, 42-43'000 judoj.

⁴⁹ Dioj el la persa mitologio, kiuj simbolas la bonon kaj malbonon.

⁵⁰ Latinlingve por pensu (konsciu) pri tio, Germanio, aŭ simile.

Klarigoj pri la traduko(j): La Esperantan tekston verkis Andreas Künzli (Bern) surbaze de la germanlingva versio, kies aŭtorajn rajtojn posedas Frank Beer (Germanio), kiu afable kaj skribe konsentis, ke mi povas uzi lian tekston por esperantigi la verkaĵon de Datner. La germana traduko de Frank Beer siaflanke baziĝas sur la anglalingva teksto, kiu estas alirebla sub <http://www.zchor.org/bialystok/testimony.htm> (kun fotoj de la membroj de la bjalistoka rezista movado). La germana versio estis komparita kun la pola originalo fare de Małgorzata Gardocka. La komentojn en la piednotoj aldonis la eldonistoj de la originaj eldonoj, kaj ili estis kompletigitaj de la tradukinto de la Esperanto-versio, kiu ankaŭ enkondukis la subtitolojn.



1931



Tombo en Varsovio

Szymon Datner (1902-1989),

dua foto troveblas sur <http://www.jhi.pl/en/blog/2013-12-10-szymon-datner-a-man-with-a-biography-enough-for-a-few-people>

(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Esenca bibliografio pri la temo:

Datner, Szymon: Kampf und Zerstörung des Ghettos von Białystok. En: Frank Beer ... [k.a.] (eld.): Nach dem Untergang. Berlin, Metropol, 2014 (2a eld.). 652 p. p. 131-164. (<https://www.swissbib.ch/Record/326261265>).

Datner, Szymon: Walka i zagłada białostockiego ghetta. Łódź, Centralna żydowska komisja historyczna, 1946. 48 p. (La anglalingvan tradukon vd. sub <http://www.zchor.org/bialystok/testimony.htm>.)

Datner, Szymon: Der kamf un khurbn fun jidishn bialistok un bialistoker provints. Białystok 1946.

Datner, Szymon: Las sprawiedliwych. [Karta z dziejów ratowania Żydów w okupowanej Polsce]. Warszawa, Książka i Wiedza, 1968. 115 p.

Datner, Szymon: Crimes Against POWS. Responsibility of the Wehrmacht. Warszawa, Zachodnia Agencja Prasowa, 1964. 382 p.

Datner, Szymon; Gumkowski, Janusz; Leszczyński, Kazimierz: Le génocide Nazi 1939-1945. Warszawa, Wydawnictwo Zachodnie, 1962. 381 p.

Stoll, Katrin: Erinnerungsreden Szymon Datners: Frühe Zeugnisse eines Holocaust-Überlebenden aus Białystok. En: Jahrbuch des Simon-Dubnow-Instituts / Simon Dubnow Institute Yearbook XI (2012). p. 309-332.

Anders, F.; Stoll, K.; Wilke, K. (eld.): Der Judenrat von Białystok. Dokumente aus dem Archiv des Białystoker Ghettos 1941-1943. Paderborn, Schoeningh Verlag, 2010.

Grossman, Chaika: The underground army. Fighters of the Bialystok ghetto. Tradukita el la hebrea lingvo de Shmuel Beeri, eldonita de Sol Lewis. New York, NY, Holocaust Library, 1987.

Grossman, Chaika: Die Untergrundarmee. Der jüdische Widerstand in Białystok. Ein autobiographischer Bericht. Tradukita el la usona angla kaj kun antaŭparolo de Ingrid Strobl. Frankfurt am Main, Fischer-Taschenbuch-Verlag, 1993.

Gutman, Israel k.a.: Encyclopedia of the Holocaust. New York, Macmillan Publishing Company, 1990.

Mark, B.: Ruch oporu w getcie białostockim. Samoobrona-zagłada-powstanie, Warszawa 1952.

Беркнер, С. С.: Жизнь и борьба белостокского гетто, записки участника Сопротивления. Москва, Фонд Холокост, 2001.

Bender, Sara (tradukita de Yaffa Murciano): The Jews of Białystok during World War II and the Holocaust. Waltham (Mass.), Brandeis University Press, 2008.

Szymon Datner kaj lia familio en Bjalistoko en 1938 (fotografajo):

<http://www.jhi.pl/publikacje/106>

Artikolo en Vikipedio (pola):

https://pl.wikipedia.org/wiki/Szymon_Datner

Artikolo sur la retpaĝo de la Juda Historia Instituto (Żydowski Instytut Historyczny im. Emanuela Ringelbluma):

<http://www.jhi.pl/en/blog/2013-12-10-szymon-datner-a-man-with-a-biography-enough-for-a-few-people>

<http://www.jhi.pl/blog/2013-12-10-szymon-datner-czlowiek-ktory-moglby-obdzielic-swoja-biografia-kilka-osob>.

Bildoj de la Bjalistoka geto:

<https://www.pinterest.com/marmaladeqat/bialystok-ghetto/?lp=true>.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, Andreas Künzli (Berno, Svislando), 2017. Traduko reviziita en 2020.

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio (kiu ricevis la „stipendion Lapenna“) kaj estis diplomita per la akademia titolo lic. phil. (kiu egalas al la poste enkondukita M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

This is a non-commercial projet for educational purposes, such as teaching, scholarship and research. In case of problems with copyright, please contact the author.

Pri la reuzado de bildoj el Vikipedio vd.:

<https://de.wikipedia.org/wiki/Wikipedia:Weiternutzung>

<https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Weiterverwendung>